der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund e. V.

26. Jahrgang Nr. 161 (3/1990) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Vivu Rumana Esperanto-Asocio!

La 26-an de februaro 1990 nia oficejo havis surprizan kaj tre karan vizitanton: prof. d-ro Florin I. Bociort el la heroa urbo Timişoara, la fondinto de la moderna rumana Esperanto-movado. Kompreneble la membroj de GDREA tre kunsentis kun la subpremita kaj leviĝinta rumana popolo, kiu pagis sian venkon super la diktatoro per multe da sango. En Timişoara la bataloj estis aparte kruelaj. Kaj ni timis pri prof. Bociort, kiu gvidis ĝis la 5-a de marto 1985 la Kolektivon Esperanto-interlingvistiko en la universitato de Timişoara. Ĝuste tiun tagon la viokulturministro estis malpermesinta la pluan agadon.

Prof. Bociort faris tre multajn klopodojn por konvinki la aŭtoritatulojn, ke la decido estis malĝusta kaj por la reputacio de Rumanio rekte malutila. Sen sukceso. Hodiaŭ ni pli bone komprenas la situacion, post la malkaŝo de la gigantaj krimoj de la reginta familio. Kiel rakontis la profesoro, estis ĉefe tri kialoj por la malpermeso: a) la sekureca servo, la fifama „Sekuritate" timis la nekontroleblajn internaciajn ligojn, pri kiuj disponis la rumanaj esperantistoj. b) Malgraŭ la tre sukcesa agado de prof. Bociort ĝuste inter lingvistoj, kelkaj tre influhavaj estis kontraŭuloj de Esperanto. Al ili fidis la aŭtoritatoj. Kaj c) oni vidis en Esperanto konkurencon kontraŭ aliaj naciaj lingvo. Nu — tio pasis.

Prof. Bociort fariĝis adepto de Esperanto ĝuste en Berlin, dum la jaro 1968, kiam li laboris kiel gastdocento (1965 — 1970) en Humboldt-Universitato de Berlin (GDR). Kaj jen, subite li staras en la oficejo de GDREA, evidente tre feliĉa pri la nova etapo en la historio de Rumanio, kiu sendube donas novan ŝancon ankaŭ al Esperanto. La unuaj rezultoj jam ekzistas: Fondiĝis Rumana Esperanto-Asocio. Prezidanto elektiĝis prof. Bociort. Vicprezidantoj estas d-roj A. Boia kaj C. Dominte. Sekretario de REA estas d-ro M. Constantinesco. REA havas en Rumanio la bazon por ĉ. 40 filioj. Krome fondiĝis Rumana Universitata Esperanto-Centro kun sidejo en Timişoara. La estro de tiu centro estas ankaŭ prof. Bociort. Vicestroj estas prof d-ro Hans Bettisch kaj doc. Minerva Bocsşa.

La nombro de esperantistoj en Rumanio estas malfacile taksebla. La asocio disponas pri pli ol 3 000 adresoj. Karakterizaĵo estas, ke preskaŭ mankas veteranoj. La esperantistoj jam estis malpermesitaj dum la 30-aj jaroj, kiam regis faŝisma reĝimo. La plej multaj lernis dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj la lingvon en universitataj kursoj, kiuj multis tra la lando. Verŝajne Rumanio estas la sola lando en tutmonda skalo, kie la renaskiĝo de la Esperanto-movado okazis preskaŭ ekskluzive en la akademiaj sferoj kaj helpe de universitataj kaj akademiaj altranguloj.

Jen la unuaj informoj, kiujn ni ricevis el kometenta buŝo. Restas, provizore, nur deziri al la rumanaj esperantistoj sukceson en ilia agado. **D. B.**

Materialoj de la Akademio de Esperanto

Rezolucio pri la participoj

Dum la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro D-ro L. L. Zamenhof kun la tiama Esperantistaro estigis „Akademion" ĝuste por kontroligi la evoluon de la Lingvo per arbitracia institucio: „Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur i n t e r k o n s e n t o , tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato[1]) tion postulus"[2]). La uzado de la participoj montris la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj; sed tiu kun aspektaj valoroj estas la pli malnova, la pli beletra, kaj la Fundamenta. Surbaze de detalaj studoj ankaŭ la Akademio agnoskis la aspektisman signifon de la participoj, kaj neatento al tia decido devas esti konsiderata kiel lingva eraro. Instigo al eraro aŭ propagando por teorioj kontraŭaj al la agnosko de la Akademio povas konduki nur al skismo kaj disdialektiĝo. Redaktoroj kaj recenzistoj, eldonistoj kaj libroservoj havas grandan respondecon pri la unueco de la lingvo.

Por la Akademio, ties Prezidanto,
D-ro André Albault

Listo de normaj landnomoj

Tiu listo limiĝas al la geografiaj radikoj, kiuj estas necesaj por ke ĉiu povu kunmeti la tradukon de la oficialaj ŝtatnomoj de la Ŝtatoj-Membroj de UN. Tiu ĉi monda institucio efektive eldonis tian liston entenantan la oficialajn nomojn, kiujn la ŝtatoj donis al si mem: tiujn nomojn ili donis en la tri lingvoj Angla, Franca kaj Hispana.

Tio signifas, ke en tiu listo ni ne donas kompleksajn nomojn de ŝtatoj: ekz-e. tie oni ne trovos **Germana D. R.,** sed nur **German-ujo/Germanio.** Aliparte estas ŝtatoj, kiuj trudis apartaĵojn de sia oficiala nomo al la internacia publiko. Tio klarigas la motivon, pro kiu ni listigis landojn ofte nomatajn **Britujo/Britio, Salvadoro** kaj **Lanko** sub jenaj formoj: **(Grand-)Britujo/(Grand-)Britio, (El-)Salvadoro** kaj **(Sri-)Lanko.** La interkrampaĵon oni uzos aŭ ne uzos laŭ la grado de oficialeco, kiun oni deziros doni al la teksto. Ĉiukaze estos ĉiam rekomendite formi simplajn ano-nomojn: **Britoj, Salvadoranoj** kaj **Lankanoj.**

La landnomoj apartenas al du klasoj: la ĉefa klaso estas tiu de **Land-o ... Landanoj;** ĝi entenas la grandan plimulton da nomoj. La dua klaso estas akcesora kaj koncernas nur malplimulton da nomoj; ĝi estas la klaso de **Hom-oj .. Hom-ujo/Hom-io/Hom-lando.**

Fine, ni deklaru, ke tiu listo ne estis establita „ideale". Ni devis kalkuli kun la kutimoj, kiuj establiĝis dum nia centjara historio. Apartan problemon kreis al ni tiaj landnomoj, kiuj en la uzado apartenis al du klasoj; la Akademio devis tranĉi la Gordian nodon, ne profite al unu nacio, sed ja por la monda profito de la tuta lingvo. Ĝi pardonpetas apud tiuj, kiuj .. erare laŭ ni .. sentus sin vunditaj de la faritaj elektoj. Ni nur agis por la bono de la tuta lingvo.

1. Unua klaso de landnomoj (Lando — Landanoj)

Tiu klaso de „neŭtrale geografiaj nomoj" (Zamenhof), de kiu oni povas unuece formi la nomon de anoj per la sufikso **-anoj,** konsistigas la ĉefan klason de landnomoj en Esperanto: ĝi entenas la plej multajn el ili (ĉ. 130 el 165). Plie ĝi obeas al la konstato de Boirac, unua Prezidanto de la Akademio: „La ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso **-an** ...; la alia maniero ... estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda"[3]).

Afriko*8*, Alĝerio*8*, Andoro, Angolo, Antigvo, Argentino, Aŭstralio*8*,

Aŭstrio[4]), Bahamoj, Bangladeŝo, Barbado, Barbudo, Barejno, Belizo, Benino, Birmo*8*, Bocvano, Bolivio*8*, Brazilo*8*5), Brunejo, Burkino[6]), Burundo, Butano, Ĉado, Ĉilio, Domingo[7]), Ebur-Bordo, Egipto[8]), Ekvadoro*8*, Fiĝioj, Filipinoj, Gabono, Gambio[9]), Ganao, Grenado, Grenadinoj, Gujano[10]), Gvatemalo*8*, Gvineo*8*11), Ĝibutio, Haitio[12]), Honduro, Indonezio, Irako*8*, Irano*8*13), Irlando*8*, Islando*8*, Israelo[14]), Jamajko, Jemeno, Jordanio, Kameruno, Kampuĉeo, Kabo-Verdo, Kanado*8*, Kataro, Kenjo, Kipro, Kiribato, Kolombio[15]), Komoroj, Kongolo, Koreo[16]), Kostariko*8*, Kubo*8*, Kuvajto, (Sri-)Lanko, Laoso, Lesoto, Libano*8*, Liberio*8*, Libio*8*, Liĥtenŝtejno, Luksemburgo, Madagaskaro[17]), Malajzio, Malavio, Maldivoj, Malio, Malto, Maroko*8*, Maŭricio, Meksiko*8*18), Monako, Mozambiko, Nauro, Nederlando*8*, Nepalo, Neviso, Niĝero, Nikaragvo*8*, Omano, Pakistano*8*, Panamo*8*, Papuo[19]), Paragvajo*8*, Peruo*8*, Principeo, Ruando, Salomonoj, (El-) Salvadoro, Samoo, San-Marino, Sao-Tomeo, Sejŝeloj, Senegalo[20]), Sent-Kristofo, Sent-Lucio, Sent-Vincenio, Siere-Leono, Singapuro, Sirio*8*, Sovetio[21]), Sudano*8*, Surinamo, Tajlando[22]), Tajvano, Tanzanio, Tobago, Togolo, Tongo, Trinidado, Tunizio*8*, Tuvalo, Ugando, Ukrajno[23]), Urugvajo*8*, Usono[24]), Vanuatuo, Vatikano[25]), Venezuelo*8*, Vjet-Namo, Zairo, Zambio, Zelando, Zimbabvo.

Eksterliste: Groenlando/Gronlando, Siberio

2. Dua Klaso de landnomoj (Homoj — Homujo/Homlando . .)

Tiuj landnomoj estas derivaĵoj de landano-nomoj kaj estas diverse formitaj: per sufikse uzataj vortoj (-land-, -(i)stan-, . . .) aŭ per sufiksoj (uj-, -i-). Tiu maniero formi landnomojn „estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" (Boirac 1). La sufikso -uj- „servas por elfari nomojn . . . de landoj, sed nur kiam oni nomas landon per la nomo de la gento aŭ nacio ĝin loĝanta" (Boirac 1). La sufikso -i- en tiaj kazoj povas anstataŭi la sufikson -uj-, sed principe „nur se tiel ĝi formas internacian nomon" (Cart).

2.1.: 1-a Grupo: sufikso -ujo aŭ sufikso -io

En tiu grupo la du sufiksoj estas egale uzeblaj; estas rekomendite uzi nur unu saman en difinita teksto.

a) la io-formo estas sendube internacia

Albanujo/Albanio*8*, Arabujo/Arabio*8*, Belgujo/Belgio*8*, Belorusujo/Belorusio, Bulgarujo/Bulgario*8*, Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio, Etiopujo/Etiopio*8*, Francujo/Francio$^{f\text{-}to}$, Germanujo/Germanio$^{f\text{-}to}$, Grekujo/Grekio*8*, Hispanujo/Hispanio$^{f\text{-}to}$, Hungarujo/Hungario*8*, Italujo/Italio*8*, Jugoslavujo/Jugoslavio, Maŭritanujo/Maŭritanio, Mongolujo/Mongolio, Norvegujo/Norvegio*8*, Rumanujo/Rumanio *8*, Somalujo/Somalio, Svedujo/Svedio*8*, Turkujo/Turkio$^{f\text{-}to}$.

Eksterliste: Armenujo/Armenio, Estonujo/Estonio, Latvujo/Latvio*8*, Rusujo/Rusio$^{f\text{-}to}$.

b) la io-formo estas Slave internacia, sed de Latina deveno: Danujo/Danio*8*, Portugalujo/Portugalio.

Eksterliste: Anglujo/Anglio$^{f\text{-}to}$.

c) la io-formo estas ne internacia pro la uzata radiko: (Grand-)Britujo/(Grand-)Britio, Hindujo/Hindio[26]).

ĉ) la io-formo estas ne internacia, ĉar la radiko devus aparteni al la unua klaso: ili apartenas al la arkaika sistemo („Amerikoj vivas en Amerikujo"). Sed ili estas tradiciaj, de ĉiuj uzataj kaj ne kontestataj.

Ĉinujo/Ĉinio, Japanujo/Japanio[27]).

2.2.: 2-a Grupo: sufikse uzata vorto -lando

a) la nomo estas sendube internacia

Finnlando, Svazilando.

Eksterliste: Skotlando[28])

b) la nomo estas akceptebla Esperantismo

Pollando, Svislando.

2.3.: 3-a Grupo: sufikse uzata vorto -(i)stano

Afganistano.

Eksterliste: Kirgizistano, Uzbekistano.

3. Ŝtatnomoj

Surbaze de la normigitaj landnomoj kiu ajn povos mem formi ŝtatnomojn helpante sin per pliaj vortoj troveblaj en la vortaroj. Ekzemple, surbaze de la nomo German-ujo/German-io, eblos formi la ŝtatnomon Demokratia Germana Respubliko helpante sin per la vortoj demokratia kaj respubliko:
La plej multaj el tiuj „help-vortoj" jam estas Fundamentaj aŭ Oficialaj. Tamen **kelkaj eĉ ne estas registritaj en** P. I. V.: ili enkondukiĝos per si mem laŭ la kreskanta uzado. Aliaj troviĝantaj en P. I. V. meritus esti oficialigitaj, sed ni kotentiĝos enmeti ilin en anekso al la listo de normigitaj landnomoj: estas ja malfacile antaŭvidi daton de proksima Oficiala Aldono Fine kelkaj derivitaj vortoj aperos ankaŭ en tiu anekso, kune kun kelkaj propraj nomoj. Ni do havos jenan liston plurpartan.

3.1. Vortoj ne-oficialaj aperantaj en P. I. V.

dominio	Islamo	monarko	soveto
federala	kooperativo	monarkio	unio

3.2. Teritorioj regataj de diversaj tradiciaj estroj (kun la UNo-tradukoj al A.F.H.)

duk-io	duchy	duché	ducado
emir-io	emirate	émirat	emirato
princ-io	principality	principauté	principado
reĝ-io	kingdom	royaume	reino
sultan-io	sultanate	sultanat	sultania

3.3. Adjektivoj kun politika senco (same kun tradukoj al A.F.H.)

federativa	federative	fédératif(-ve)	federativo (-a)
socialista	socialist	socialiste	socialisto (-a)
sendependa	independent	indépendant	independiente
unia/unuigita [unuiĝinta]	united	uni	unido (-a-)

3.4. Propraj nomoj de dinastioj (kun tradukoj al A.F.H.)

Haŝima	Hashemite	hachémite	hachemito (-a)
Saŭda	Saudi	saoudite	saudito (-a)

3.5. Ŝtataj reĝim-nomoj

Ĝamahirio (el la Araba: Jamahiriyah, lando de amasoj)
Komonvelto (el la Angla: Commonwealth, lando de komuna bonfarto)

4. Rekomendoj pri propraj nomoj

1. La Akademio agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas esperantigi sian nomon laŭ sia bontrovo. Ĉiu rajtas ankaŭ elekti pseŭdonimon aŭ plumnomon por si.

2. La Akademio ankaŭ agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas konservi sian aŭtentan nomon laŭ la originala ortografio, se nur ĝi estas skribita per Latinaj literoj. Li tiam devas toleri, ke la specialaj supersignoj aŭ aliaj signoj de lia lingvo eventuale malaperos; ankaŭ ke lia nomo estos prononcita en alia maniero ol en lia lingvo.
Se la kvar ne-Esperantaj Latinaj literoj q, w, x kaj y aperos en la originala skribo de nomo, la Akademio konsilas prononci ilin jene:
q kiel k; kaj qu kiel kv.
w kiel v en nomoj de Germana aŭ Pola deveno; ankaŭ de Nederlanda deveno.
w kiel la w de la Internacia Fonetika Alfabeto, por ĉiuj aliaj lingvoj.
x kiel ks.

y kiel j, se antaŭ aŭ post vokalo.
y kiel i en aliaj okazoj.

3. La Akademio konstatas, ke la granda plimulto de personoj el aliaj skribo-regionoj jam kutimas transskribi siajn nomojn per la Esperanto-alfabeto. Tamen malplimulto transskribas siajn nomojn laŭ kutimoj de aliaj lingvoj; ordinare temas pri la Angla aŭ la Franca; sed povas esti ankaŭ laŭ la preskribo de la oficiala Latina transskribo por la koncerna nacia lingvo (kazo de la Ĉina kaj de aliaj).

4. La Akademio konsilas, ke neniu trudu al aliaj personoj manieron ŝanĝi aŭ transskribi sian nomon eĉ skribe. Propra nomo estas apartenaĵo de ĉiu individuo.

Notoj

f-to: Fundamento; la radiko estas Fundamenta.

8: Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.

[1]) Nun la Akademio de Esperanto, kiu „transprenis la celojn kaj laborojn de la antaŭa Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio" (Art. 1 de la Statuto).

[2]) Respondo 47, „Oficiala Gazeto", 1911, p. 291.

[3]) Antaŭparolo al la „Plena Vortaro Eo-Franca kaj Eo-Esperanta" (1909)

[4]) Sed eblos diri: **Aŭstrio-Hungario.** Esence la radiko **aŭstr-**signifas oriento; ĝi aperas kiel mallongigo de **Aŭstrio** en kunmetajoj.

[5]) La ĉefurbo estas **Braziljo,** laŭ la Portugala prononco.

[6]) „Faso" (en Burkina Faso) ne tradukiĝas: ĝi signifas „hejmlando, patrio". Antaŭe: Supra-Volto.

[7]) Ni reprenis malnovan nomon, ĉar transskribo de „Dominicana" konfuzigus kun „anoj de Dominiko" . . . Kp. noton 10.

[8]) Ekskluzive uzata en la ĉefverka traduko de Kabe „La Faraono". Ni preferu tiun formon omaĝe al nia granda verkisto.

[9]) Pro peto de la Gambia Prezidanto kaj interveno de Senegalo kreiĝis inter la du landoj konfederacio sub la nomo Senegambio (dec. 1981).

[10]) **Gujano,** nova nomo de sendependiĝinta ŝtato (Guyana), kun ĉefurbo Georgtaŭno, eks-Brita **Gviano** (Guiana); apartenas al la regiono de **Gvajanoj,** kune kun **Surinamo** (eksa Nederlanda Gviano) kaj la **Franca Gviano,** krom la Venezuala kaj Brazila partoj de Gvajanoj.

[11]) Nomo de kvar ŝtatoj, el kiuj tri respublikoj: **Res. Gvineo, Res. Gvineo-Bisaŭo** (ĉefurbo: Bisaŭo), kaj **Ekvatora-Gvineo** (antaŭe kaj respektive: Franca, Portugala kaj Hispana Gvineoj). La kvara estas monarkio: **Papuo-Nov-Gvineo** (Vd. noton 17).

[12]) **Respubliko Haitio** okupas la okcidentan parton de la insulo **Hispaniolo,** dum la **Dominga Respubliko** — la orientan.

[13]) Kun la **Persa lingvo** (kaj la iama Persujo/Persio).

[14]) Kun la **Hebrea** f-to **lingvo.**

[15]) **Ne konfuzu kun Kolumbio,** Usona federala distrikto kun ĉefurbo Vaŝingtono.

[16]) Nomo monde internacia. La Korea etno nomiĝas Hanoj; sinonimo por la lando: **Hanlando.** Ne konfuzu Hanoj kun Ĥanoj, ĉefgento de Ĉinio.

[17]) Kun la **Malagasa lingvo.**

[18]) Sed: **urbo Meksiko** aŭ **Meksiko-urbo** (H. Ciudad de México City . . .).

[19]) **Papuo-Nov-Gvineo** rezultas el unuigo de **Nov-Gvineo sub protekto de Aŭstralio** kaj de **Papuo,** ankaŭ nomita **Aŭstralia Nov-Gvineo;** cetere la tria parto de la sama insulo estas la **Okcidenta Nov-Gvineo,** nun **Iriano** (dependajo de Indonezio). En Papu-Nov-Gvineo estas parolataj ĉ. 700 lingvoj kaj unu komuna, la Bislama (Bichelamar aŭ Melanezia piĝino). Tieaj Eŭropanoj parolas Angle.

[20]) Vd. noton 7.

[21]) Nepre utila pro sia derivajo: Sovetianoj; ĝi estas mallongigo por Sovet-Unio, kies plena oficiala nomo estas: Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, kiun oni iafoje skribas sigle: U.S.S.R.

[22]) Iuj Tajoj estas nacioj de aliaj landoj: Birmo, Laoso (Tajlaoj) . . .

[23]) La landnomo signifas proksimume: landlima lando. Tial estas eraro nomi per ĝi la landanojn.

[24]) Tradicia mallonga nomo por Uniaj/Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko (U.Ŝ.A.).

[25]) Teritorio! Sed en Ekleziaj rilatoj kutimas uzadi: Sankta Seĝo (Rim. de U.N.).

[26]) En tiu federala lando estas parolataj ĉ. 14 oficialaj lingvoj ŝtataj (la Hinda, Bengala, Telugua, Marata, Tamila, Urdua, Gurĝarata, Malajalama, Kannada, Orija, Panĝaba, Asama, Kaŝmira, Sinda) krom ĉ. 125 aliaj parolataj de 13 % de la popolo. Plie du lingvoj estas federalaj: la Angla (parolata de 1 % de la popolo) kaj la Hinda (ĉ. 30 % de la popolo). Jam de pluraj jarcentoj la lando nomiĝas en la diversaj Hindiaj lingvoj „Bharata", aŭ laŭ misformiĝoj de tiu Sanskrita nomo; tiu oficiala nomo liveras sinonimon al nia lingvo: Barato . . . La rivernomo Indo naskis diversajn nomojn: Indonezio, . . . kaj Indo-Eŭropa (uzata jam de Cart kaj de Privat), Indo-Irana, . . .

[27]) Sinonimo: Nipono.

[28]) Sed la Kanada provinco estas Nova-Skotio (Nova Scotia).

[El „La letero de l'Akademio de Esperanto, 7. aprilo — majo — junio 1989]

Spertoj pri terminologia laboro

Dum la jaroj 1980 ĝis 1985, kelkaj esperantistaj komputistoj el GDR komencis kolekti fakvortojn pri komputado. Post okupiĝo pri ĝenerala terminologio, ni komprenis, ke necesas aldoni difinojn, limigi la fakon kaj prezenti ĉion laŭ la sistemo. En 1988 la Komputista Fakrondo (KFR) en GDREA decidis establi Terminografian Komisionon pri Komputiko (TK/K). En la Fondiĝa Deklaro el 1988-06-06 ni difinis la laborplanon, la limigon de la fako, la kunlaborantojn, la provizoran transliteradon el la rusakirila alfabeto, niajn gvidprincipojn de la ellaborado de normaj terminaroj, la regularojn por kreantoj kaj kunlaborantoj, la mallongigojn kaj la teknikan aranĝon.
Pro diversaj kaŭzoj, ni unue elektis la iomete eksmodiĝintan, sed havigeblan IFIP-terminaron kiel modelon, kaj nur poste disponis ankaŭ pri aliaj (ISO-normo 2382, la Usona ANSI/IEEE-normo, la okcidentgermana normo DIN 44300).

1. La kreado de la kolektivo

Laŭ ĝenerala sperto, mi opinias, ke estas pli verŝajne persvadi aliajn fakulojn al kunlaboro, se ili ne devas ellabori, sed „nur" korekti aŭ pliampleksigi ricevitajn materialojn. Pro tio mi komprenas mian rolon en la Terminografia Komisiono kiel ellaboranton de malnetoj kaj redaktanton de ĉiuj opinioj, kritikoj, aldonoj, komentoj.
Ne ĉiu homo posedas la afablecon respondi al letero. Pro tio mi unuatempe dissendis stelforme al ĉirkaŭ dudek personoj la unuajn malnetojn, kaj nur triono el ili respondis. Tio signifas, ke inter la libertempe laborantaj kolegoj nur la stelforma kontaktmaniero eblas, dume la ringforma nepre mortigos la aferon. (Bonvolu atenti la fakton, ke la „Laborfolioj" proponitaj de TEC celis la ringforman metodon.) Tamen ni komparu la ringforman kaj la stelforman sistemojn por la nombro de 12 kolegoj, rilate al 10-paĝa malneta dokumento:

kriterio	ringforme	stelforme
bezonataj paĝoj da papero	10 p.	120 p.
bezonata tempo por komentoj	12x2 = 24 monatoj	3 m-oj
tempo por redaktoro de komentoj	1 monato	2 m-oj
ebleco de totala interrompo	jes	ne

Mi devas konkludi, ke nur eblas la stelforma metodo, kvankam ĝi postulas multe pli da laboro de la redaktanto kaj multe pli da papero. Estus bonege, se ne nur unu, sed du aŭ tri redaktantoj loĝus en unu loko. Sed tiel la realeco ne aspektas. Tamen mi ĝojas, ke la kolektivo kreskis, kaj ke ni hodiaŭ estas dek kunlaborantoj el sep landoj.

2. Spertoj rilate al la sinonimio

La IFP-terminaro konsistas el ĉapitroj, el kiuj ĉiu enhavas 30 ĝis 70 terminokompleksojn (ni diru: averaĝe: 50).
Unue mi ellaboris la unuajn kvin ĉapitrojn tiel, ke mi por ĉiu terminokomplekso kunmetis la jenon:

n-ro, 1 — 10 sinonimoj en Esperanto (eo),
1 — 3 sinonimoj por la lingvoj en, fr, ru, de
difino en eo kun referencoj al aliaj, antaŭe difinitaj terminoj

Tiutempe mi petis la kunlaborantojn:
— indiki erarojn, kaj
— indiki preferon por unu el la Esperantaj sinonimoj.

La rezulto estis, ke la preferoj de la kunlaborantoj ofte estis diversaj, sen sufiĉa indiko de la argumentoj.
Pro tio, en dua etapo, mi aldonis al la nociokompleksoj de la 1a kaj 3a ĉapitroj miajn komentojn al la Esperantaj sinonimoj kaj miajn argumentojn pri mia prefero. Tio estis ege temporaba afero, tamen necesa. Denove mi dissendis la du ĉapitrojn stelforme kaj petis

— indiki erarojn, kaj
— indiki preferon kun bone pripensita argumento.
Responde, la kunlaborantoj sendis pluajn komentojn por ĉiu terminokomplekso, kaj finfine mi povis rekoni, kiun sinonimon preferas la plimulto el ili. Por esti justa, mi kopie entajpis ĉiujn komentojn de la aliaj, kio denove bezonis multe da tempo, kaj mi aldonis finan komenton kun decido-propono favore al certa sinonimo. Sed feliĉe ni rikoltis kroman efikon: la kolegoj Pokrowski (SU) kaj Weichert (FRG) ellaboris lingvistike altnivelajn artikolojn pri diversaj sinonimoj, kiuj parte superis la laikan nivelon de la redaktanto.

3. Teoriaj necertecoj rilate al difinoj

Komparante niajn koncizajn difinojn en niaj terminokompleksoj kun la difinoj en ISO aŭ DIN, ni devas konstati, ke la aliaj ne aplikas la klasikan skemon, kiun ni preferas, kaj kiun mi tiel klarigas:
En la difino rajtas aperi nur tiuj referencoj, kiuj jam antaŭ estis difinitaj en la sama terminaro.
Sed DIN ekzemple ofte difinas per prezento de konsistpartoj de la difinato, kiuj ne estis difinitaj en la antaŭaj difinoj.
Krome, en DIN la difinoj ofte estas tro ampleksaj, ili ne limigas sin al la esenco de la afero. Konklude, mi pledas kontraŭ la propono sklave traduki nacilingvan normon. Ni uzu ilin por komparoj kaj lernu el ili.

4. La Esperanto-movado bremsas nin

La redaktanto kaj la aliaj, krom la terminologia laboro, kunlaboras libertempe en la Esperanto-movado (instruas, preparas aranĝojn, redaktas informilojn, ktp.). Sekve okazas, ke li resp. ili eĉ dum unu aŭ du monatoj ne tuŝas la aferon de la terminologio, antaŭ ol denove okupiĝi pri ĝi.
Samtempe okazis alia disputo: Ni trovis kontaktojn al la membroj de la Akademio de Esperanto d-ro Albault (ties prezidanto) kaj R. Eichholz. Ili insistis en aliaj starpunktoj, minimume rilate al la bazaj nocioj
— datum/o — data — données — Daten kaj
— komputado — data processing — Datenverarbeitung.
Post iliaj opini-esprimoj, mi konsentis al denova rekonsiderado de tiuj terminoj fare de niaj kunlaborantoj. La disputoj kaj korespondadoj bezonis duonan jaron kaj ne alportis ion novan, ĉar la plimulto de la kunlaborantoj ne ŝanĝis la opinion. Sed minimume ni kolektis pli da argumentoj por la preferitaj sinonimoj.

5. Konkludoj

5.1. Niaj fortoj ne sufiĉas

La Esperanto-movado tro malrapide produktas novajn fakulojn. La praktiko montras, ke neniu fakulo povas okupiĝi ekskluzive nur pri faka aŭ terminologia apliko de la lingvo. La sekvoj estas simplaj. La planoj por eldoni iun vortaron aŭ terminaron ne estas plenumeblaj, la memdifinitaj limdatoj multfoje prokrastiĝis. El tio sekvas ankaŭ, ke la ideoj de s-ro Eichholz pri PekoTeko kaj pri la Elektronika Terminarego, kiuj postulas multoblan kvanton da laboro, tute ne estas realigeblaj kaj restas bela revo.

5.2. Proponi duonproduktojn

La ĉapitroj aŭ partoj de terminaro enhavu indikojn pri la stato de la ellaborado. Se iu interesiĝanto deziras havi la ĝisnunajn rezultojn, li sendu disketon al la redaktanto kaj ili ricevos kopion de la nuna stato de la terminaro (se la leĝoj kaj la praktiko de limkontroloj tion permesas).
Nuntempe (1989—05) la stato de la ellaborado estas tia, ke nia TK/K povas proponi al la aproba procedo de TEC la 1an kaj 3an ĉapitrojn de la terminaro (t.e. 109 terminoj). La aliaj ĉapitroj estas ankoraŭ objektoj de la diskutado en nia TK/K, tamen eblas la transdono per disketo por utiligi la ĝisnunajn rezultojn.

(daŭrigo p. 56)

La gazeto „Völkerspiegel"

1. Proleta Esperanta Gazetara Servo de GLEA

La Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA), fondita 1911 en Leipzig, unue limigis siajn aktivecojn pli mal pli je la propagando de Esperanto inter laboristoj.

La spertoj de la unua mondmilito, la influo de la Oktobra Revolucio en Rusio kaj de la Novembra Revolucio en Germanio je germanaj laboristoj kaj la pliaktiviĝintaj politikaj konfliktoj en Germanio dum la 20-aj jaroj konsciigis multajn membrojn de GLEA pri la neceso utiligi Esperanton pli celkonscie por celoj de la interesoj de la laborista klaso en Germanio kaj tutmonde. Unu el la gravaj interesoj estis plifirmigi la internaciajn rilatojn kun alilingvaj laboristoj, plifortigi ilian internacian solidarecon. Ĉi-lige aparte gravis senpera interŝanĝo de informoj pri la ĉiutagaj politikaj kaj ekonomiaj agoj de la laboristoj en la diversaj landoj. Kompreneble, la germanaj kaj alilandaj laboristoj havis grandan informbezonon pri la evoluo de la juna Sovetunio, kie oni komencis konstrui novan ŝtaton. Pro tio la laboristaj esperantistoj utiligis sian avantaĝon de rekta kontakto kun civitanoj el Soveta Unio — pere de Esperanto. Feliĉe ili trovis tre viglajn partnerojn[1]). Jam 4 jarojn post la venko de la Oktobra Revolucio, 1921 dum la 3-a Tutruslanda Kongreso de Esperantistoj fondiĝis Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU)[2]). La konkretaj korespondaj ligoj de la laboristaj esperantistoj al Soveta Unio kaj al aliaj landoj montriĝis tiom multflankaj kaj interesaj, ke en GLEA aperis la plano fondi Proletan Esperanto-Gazetaran Servon (Proletarischer Esperanto-Pressedienst, PEP). Ĝin fondis grupo de GLEA „Frateco" en Leipzig en la jaro 1922, kaj ĝi fariĝis ekde 1924 oficiala institucio de GLEA.

En unua resuma raporto[3]) pri la celoj kaj unuaj atingoj de PEP, ties gvidinto Erich Lämmerhirt raportis i. a., ke dum 2 jaroj 3 360 manuskriptoj kun raportoj de laboristaj esperantistoj el diversaj landoj estis dissenditaj al 176 germanlingvaj gazetaj redakcioj kaj 150 manuskriptoj al 7 eksterlandaj esperantistaj gazetaraj servoj.

Ekde 1925 PEP estis gvidata de Otto Bäßler. La efiko de PEP estis konsiderinda. Sole en la komunista gazeto de Saksio „Sächsische Arbeiter-Zeitung" (Saksa Laborista Gazeto) de 1924 ĝis fino de 1932 (malpermeso) aperis ĉirkaŭ 400 kontribuoj[4]).

2. „Völkerspiegel"

Interesa kaj ne tre konata pruvo pri la rapida kaj efika funkciado de la internaciaj ĵurnalismaj rilatoj de la laboristaj esperantistoj estas la germanlingva revuo „Völkerspiegel" (Spegulo de la Popoloj)[5]).

La 10-an de oktobro 1923 en Saksio, geografia kaj administra regiono de Germanio, socialdemokratoj kaj komunistoj formis koalicion kaj tiel kreis laboristan registaron. Post ses tagoj simila registaro estiĝis en Turingio. La Centra registaro, gvidita de la dekstra socialdemokrato Friedrich Ebert, regna prezidento, permesis, ke la regna armeo (Reichswehr) post 4 semajnoj likvidis tiujn registarojn. La 23-an de novembro 1923 la registaro malpermesis la Komunistan Partion de Germa-

---

5.3. Daŭrigi la laboron sen limdatoj (daŭrigo de p. 55)

Laŭ niaj disponeblaj fortoj ni daŭrigu la laboron, sed ni ne plu havu iluziojn pri finpretigo ĝis certa limdato. Sed ankaŭ povas okazi, ke ni petos niajn kolegojn, prefere helpi vivteni la Esperanto-movadon kaj ne plu daŭrigi la terminologian laboron, ĉar nenio povas funkcii sen la bazo el homoj.

Michael Behr
(koncizigita)

nio KPD kaj ankaŭ ĉiujn ĝiajn gazetojn. La malpermeso ankaŭ trafis la komunistan gazeton de Saksio, „Sächsische Arbeiter-Zeitung" (SAZ), (Saksa Laborista Gazeto), kiu aperis en Leipzig (Lajpcig). Laboristaj esperantistoj kaj komunistoj serĉis eblecon, iel anstataŭ la malpermesitan organon. Post komplikaj traktadoj kun la polica prezidio de ĉefaj aktivuloj de la Proletarischer Esperanto-Pressedienst (PEP), Otto Bäßler[6]) kaj Walter Kampfrad[7]) atingis la permeson eldoni germanlingvan gazeton kun la titolo „Völkerspiegel" (Spegulo de la Popoloj). La periodaĵo aperis en la formato de taga gazeto kun 4 — 8 paĝoj, en granda eldonkvanto. Oni presis ĝin en la presejo de la malpermesita SAZ, en „Uns-Produktiv-Genossenschaft", fakte komunista entrepreno, kiu tamen sukcesis esti ne malpermesita. La gazeto estis anoncita kiel peresperanta gazeto kun la presita slogano „Esperanto im Dienste der Berichterstattung" („Esperanto en la servo de la raportado"). Ĝi aperis dufoje monate, entute ĝis oktobro 1924 (kiam reaperis SAZ) kun 16 numeroj. La numeroj entenis materialojn tradukitaj el proletaj Esperanto-revuoj, i.a. el „Sennacieca Revuo", „Sennaciulo", „Nova Epoko". La redaktoroj ankaŭ ricevis multe da materialoj de eksterlandaj laboristaj esperantistoj. Jam en la unua numero oni trovas i. a. jenajn artikolojn:

— „Pri la laborkondiĉoj de la sovetia proletaro"
— „Ĉiutagaĵoj en Estonio" (pri teroro kontraŭ la loĝantoj)
— „La virinoj kaj la faŝismo en Italio"
— „Letero el Bulgario" (pri teroro kontraŭ laboristoj)

Multaj raportoj informis pri la konstruado de socialismo en la sovetia ŝtato.

La redaktoro ankaŭ aplikis trukojn. Ekzemple la artikolo „La bankrota politiko de la kapitalisma socio" (en Germanio) estis subskribita per „svisa esperantisto", sed fakte venis el la plumo de la ĉefredaktoro de la malpermesita komunista SAZ. La gazeto estis disvendita al ĉiuj abonintoj de SAZ kaj distribuita per ĝia distribua sistemo, kiu atingis eĉ legantojn en Aŭstrio.

3. La policaj aktoj pri „Völkerspiegel"

Fakte oni devas miri, ke la polica prezidio de Leipzig entute donis la permeson al la laboristaj esperantistoj, fondi tian evidente politike suspektindan gazeton. La akto PPV-N-ro 55 (betr. „Völkerspiegel" 1924) en la ŝtata arkivo de Leipzig (GDR)[8]) detale informas pri du malsukcesaj provoj kaj pri la misfido, kiun — post donita eldonpermeso — la polico konservis kontraŭ la publicaĵo.
En sia petletero de 12. 12. 1923 Otto Bäßler indikas jenajn du ĉefajn celojn por la fondota gazeto:

„1. Per ĉi tiu nerekta propagando (t e. la utiligo de Esperanto — D. B.) veki inter la loĝantaro la intereson por la monda helplingvo Esperanto.

2. subteni la ideon de interpopola paco",

kaj li daŭrigas en sia letero „Ĉi tiu entrepeno ne devas fariĝi privatkapitalisma sed ĝi sekvu nur celojn de idealo." En la sama polica akto oni trovas la decidon ne permesi la eldonon de la gazeto:
„ĉar oni devas timi, ke per ĝi estos subtenataj la celoj de la malpermesita 3-a Internacio kaj de K. P. D."
Otto Bäßler protestis kontraŭ la decido kaj proponis al la policejo, ke ĝi petu ekspertizon de la direktoro de la Germana Esperanto-Instituto, prof. d-ro Johannes Dietterle pri la „tute senpartieca karaktero de la Esperanto-gazetoj kaj de la Esperanto-Societoj". Dietterle liveris la 9-an de januaro 1924 sian 4-paĝan ekspertizon, kiu sufiĉe objektive resumis la celojn kaj la neŭtralecon de Esperanto, sed koncedis, ke ĝin utiligas ankaŭ religiaj kaj diverspolitikaj grupoj, inter ili komunistaj laboristoj. Por trankviligi la polican prezidion, li finis la ekspertizon: „Mi persone taksas la gazetentreprenon sendanĝera, ĉar ĝi ja sendube celas la propagandon de Esperanto, sed cetere ĉiutempe estas kontrolebla rilate al ĝia politika tendenco". Post ĉi tiu ekspertizo la prezidio

donis tamen la eldonpermeson. Eventuale la decidon ankaŭ influis la fakto, ke en la polica prezidio de Leipzig laboris la kriminala inspektoro Paul Teuchner[9]), kiu estis aktiva esperantisto. Ankaŭ li verkis ekspertizon pri la ‚kazo Völkerspiegel', kiu ankaŭ troviĝas en la citita akto. En sia ekspertizo pri jam aperintaj numeroj de la gazeto Teuchner prave substrekas, ke la laboristaj esperantistoj utiligas la lingvon por siaj politikaj celoj. Sed li konkludas: „La esperantistaj artikoloj troviĝintaj inter la rigardita materialo, ja estas partipolitikaj, sed ne donas kaŭzon por interveni". Evidente Teuchner sentis iom da esperantista solidareco kaj iom maltrotaksis la veran politikan karakteron de la materialoj. Aliaj funkciuloj de la polica prezidio juĝis multe pli objektive pri la politika karaktero de „Völkerspiegel". Ekzemple skribis Registara Konsilisto (Regierungsrat) v. Criegern la 19-an de marto 1924: „Okaze de domtraserĉo ĉe komunistoj en Freiberg/Breisgau oni i. a. trovis kelkajn numerojn de la Esperanto-revuo „Sennacieca Revuo" kaj ekzemplerojn de la Esperanto-revuo „Völkerspiegel" La unua aperadas en Esperanto kaj estas eldonata en Parizo, la alia estas skribita en la germana kaj aperas en Leipzig-a eldonejo. Ambaŭ presaĵoj estas, kiel atestas ilia enhavo, pure komunismaj kaj povus esti taksataj kiel kutimaj komunismaj fipropagandaĵoj ...

La konfiskitaj revuoj pruvas la ĝustecon de ripetitaj opinioj, ke KPD utiligas Esperanton por sia partio kaj vidas en ĉitiu mondlingvo rimedon por atingo de siaj komunismaj celoj ..."

La gazeto „Völkerspiegel" estas interesa pruvo pri la aplikateco de Esperanto en la laborista movado. Ni scias pri aliaj iom alikarakteraj revuoj, kiuj ankaŭ utiligis per Esperanto ricevitajn materialojn. Dum la jaroj 1932/33 en Bulgario aperis ekz. ka bulgarlingva „Meĵdunarodni Rabselkor" (Internacia laborista-kamparana korespondado)[10]). En Grandbritio eldoniĝis dum la 30-aj jaroj „World Contact"[11]). Supozeble ankaŭ en aliaj landoj kaj regionoj aperis similaj periodaĵoj, kiuj meritus konvenan analizon kaj prezenton.

Notoj

[1]) Kp. Blanke, D.: Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la germana-soveta amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar. En: D. Blanke (Red.), Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest 1986: Hungara Esperanto-Asocio, p. 63 — 83

[2]) Kp. Enciklopedio de Esperanto, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979, p. 589 ĝis 592

[3]) Kp. „Arbeiter-Esperantist", 10/1924, p. 65 — 66

[4]) Superrigardon prilaboris Ino Kolbe el Leipzig, la materialo aperos en broŝuro pri GLEA eldonota en Leipzig

[5]) Pri „Völkerspiegel" kp. Otto Bäßler: Fortschrittliche Traditionen. En „der esperantist", Berlin, 2, Nr. 5 — 6 (1966), p. 33—34

[6]) Otto Bäßler estis ĝis sia morto (1981) membro de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR.

[7]) Walter Kampfrad estis antaŭ sia pensiuliĝo ŝtata prokuroro en Leipzig kaj mortis 1984.

[8]) Ĉiuj sekvaj citaĵoj el dokumentoj troviĝas en ĉi tiu akto.

[9]) Pri polico kaj Esperanto kp. la artikolon de Paul Teuchner en: Enciklopedio de Esperanto, p. 441 — 442.

[10]) Kp. Maria T. Jankova-Bojaĝieva: La bulgara revolucia Esperanta gazetaro dum la periodo 1929 — 1934. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983, p. 22 — 26, 44 — 62.

[11]) Unuopaj numeroj troviĝas en IEMW, Vieno.

(La studo aperis en Senad Colić (1988, Red.): Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo: ELBIH)

Detlev Blanke

Esperantisteca jubileo

Lastjare (1989) la rumana profesoro Aurel Boia festis 60 jarojn de esperantisteco.
Naskiĝinta je la 9-a de novembro 1918, li estas doktoro pri filozofio kaj diplomito pri la ekspertizo de dokumentoj (grafologio).
D-ro Aurel Boia havis plurflankan Esperanto-agadon: fondinto de licea Asocio por Esperanto kaj Stenografio (1932); gazetaj artikoloj kaj UEA-membriĝo en la sama jaro; ekde 1957 gvidajn funkciojn en la landa movado (vicprezidanto kaj aganta prezidanto de iama Rumana Kunordiga Komitato kaj de 1978 vicestro de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko); literatura verkado (kelkaj el liaj poemoj aperis en la nova eldono de **Esperanta Antologio**); sciencaj esploroj (i. a. prelego en la Universala Kongreso en Varna, 1978); gvidanto de kursoj kaj aŭtoro de lernolibro **(11 x 11. Esperanto prin proverbe,** 1979) ktp.
Li okupis ankaŭ elstarajn poziciojn en la kampoj de dokumenta ekspertizo kaj stenografio (prezidinto de la respektivaj fakaj organizoj; parlamenta stenografo kaj direktoro de revuo).
Niajn sincerajn gratulojn!

GDREA

Ĉu Esperanta Klubo?

La kesto por la flago

de Slang

Dediĉita al la Klubo „Minerva" en Leipzig

La prezidanto leviĝas kaj komunikas ke li havas komunikaĵon por la kolegoj, nome, ke ili kunvenis, ke estas hejmeca kunveno kaj ke li petas pri afabla atento por la respondeculo, samklubano Heuschuster[1]. La respondeculo, samklubano Heuschuster, sin sidigas malantaŭ sian, la edzino de la instruisto, sinjorino Viererbl[2], lia fratino, malantaŭ sian citrojn.

Samklubano Heuschuster diras: „Citra koncerto: Adiaŭ, mia Svislando, rejnlandajo."

Instruisto Viererbl, bofrato de Heuschuster, frapas kaj kantas kun la samklubanoj-kantistoj: „La adiaŭo de la kantisto". La respondeculo, samklubano Heuschuster, sin sidigas denove malantaŭ sian, la edzino de la instruisto, sinjorino Viererbl, lia fratino, denove malantaŭ sian citrojn.

Samklubano Heuschuster diras: „Citra koncerto: Gardu vin Dio, polko-mazurko."

La prezidanto sin levas kaj plenumas la agrablan devon laŭtlegi bildkarton kiun la respondeculo, samklubano Heuschuster, sendis al la klubo okaze de dimanĉa posttagmeza ekskurso en la valon de la rivero Mulde. La prezidanto formulas dankon por samklubano Heuschuster nome de la klubo „Citra koncerto: Valo de Ziller[3], vi estas mia ĝojo."

La respondeculo, samklubano Heuschuster, leviĝas kaj plenumas la agrablan devon laŭtlegi bildkarton kiun la perzidanto de la klubo sendis al la klubo okaze de dimanĉa posttagmeza ekskurso en la valon de la rivero Mulde. La respondeculo formulas dankon por la prezidanto de la klubo nome de la klubo.

„Citra koncerto: ripeto de Valo de Ziller, vi estas mia ĝojo."

La prezidanto leviĝas kaj surprizas la samklubanojn per la komuniko ke la respondeculo, samklubano Heuschuster, faris keston por la flago de la klubo kaj ke li deziras donace transdoni ĝin al la klubo. Kaj ke per tio li meritas la dankon de la klubo. Krome la kesto havas duoblan fundon.

La kesto pasas de mano al mano.

„Recitado de samklubano instruisto Viererbl: La Hundo, en dialekto de Vogtland[4]."

La respondeculo, samklubano Heuschuster, leviĝas kaj parolas pri antaŭkondiĉo ligita al la donaco. Nome la postulo ke de nun dum ĉiu ekskurso, dum vizito de frata klubo kaj tiel plu la kluba flago en la kesto estu kunportata.

„Citra koncerto: Rozoj de la Sudo, valso por du koncertcitroj."

La prezidanto leviĝas kaj respondas al la antaŭa parolanto ke estus honora devo de la klubo plenumi la kondiĉojn de la samklubano antaŭa parolanto. Kaj ke li proponus kiel portanton de la kesto la unuan skribiston. La edzino de la instruisto, sinjorino Viererbl, sin starigas ĉe, samklubano instruisto Viererbl sin sidigas al la piano.

Samklubano Heuschuster: „La horloĝo de Löwe[5], piana peco kun kantado."

La unua skribisto frapegas sur la tablon kaj diras ke eĉ ne dum sonĝo li havus la ideon portadi tiun kestaĉon.

„Citra koncerto: Ĉiam gaje, kampara muzikaĵo." La respondeculo, samklubano Heuschuster leviĝas kaj vigle bedaŭras tion.

„Citra koncerto: La bonhumora ĉasisteto." La prezidanto leviĝas kaj oficiale proponas organizi enketon inter la samklubanoj pri tio, kiu pretus eventuale. La propono estas akceptata.

„Citra koncerto: Bela paŝtistino."

„Citra koncerto: Mia korbubeto, serenado."

„Citra koncerto: Kara trezoreto, serenado."

„Citra koncerto: Adiaŭo de l'knabinet', polko."

La respondeculo, samklubano Heuschuster, ekstaras kaj diras ke la vespero venus al sia fino. Sed antaŭe li

devus formuli dankon por la partoprenantaj artistoj nome de la klubo. Li farus tion nun. Samklubano Heuschuster premas la manojn de la edzino de la instruisto, sinjorino Viererbl, sia fratino, kaj de samklubano instruisto Viererbl, sia bofrato, por la afabla partopreno, nome de la klubo.
„Citra koncerto: La floreto Edelvejso, galopo."
„Okulumado, koncerto por citro, piano, violono kun kantado."
La prezidanto leviĝas kaj akuzas la respondeculon, samklubanon Heuschuster, pri troa rapideco. Decas ke li, la prezidanto, formulas dankon por la partoprenantaj artistoj nome de la klubo. Li faras tion nun. La prezidanto de la klubo premas la manojn de la edzino de la instruisto Viererbl, de samklubano instruisto Viererbl kaj de la respondeculo, samklubano Heuschuster, por la afabla partopreno, nome de la klubo.
„Citra koncerto: La kabaneto ĉeroja, krucpolko."
La prezidanto leviĝas kaj komunikas la rezulton de la enketo koncernanta la portadon de kesto dum ekskursoj, vizitoj de frataj kluboj kaj tiel plu. La rezulto estas, ke neniu pretus, eventuale.
„Kanto: La ĉasista saluto."
La respondeculo, samklubano Heuschuster, ekstaras kaj diras ke sub tiuj ĉi cirkonstancoj li . .
„Citra koncerto: Montaraj sonoj."
„Citra koncerto: Alpkornaj sonoj."
„Citra koncerto: Citraj sonoj."

[1921]

[1] pron.: Hojŝuster
[2] pron.: Firerbl
[3] pron.: Ciler
[4] pron.: Fogtland (montara regiono en la sudo de hodiaŭa GDR)
[5] pron.: Leve

trad.: U. Becker

Termine 1990

7. — 24. 8.
Esperanto-Radtour „DERSFIB".
A.: Maik Jung, Große Mühlstr. 12, Dippoldiswalde, 8230

19. — 26. 8.
Arta Semajno in Halle. A: EZH

18 — 24. 8.
Esperanto-Familienzeltlager „SEFT" bei Thomsdorf.
A: Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13/0202, Neubrandenburg, 2000

22. — 23. 9.
Esperanto-Kirmes der Jugend im Jazzkeller „die Tonne" in Dresden.
A: Sandra Kienast, Berzdorfer Str. 16/401, Dresden, 8036

5. — 7. 10.
Jahrestreffen der Eisenbahner-Esperantisten in Leinefelde. A: Achim Meinel, Leninplatz 31, Berlin, 1017

14. — 21. 10.
Lehrgang von Schüler-Arbeitsgemeinschaften Esperanto. A: Heinz Weißflog, Am Stadtrand 8, Saßnitz, 2355.

22. — 27. 10.
Esperanto-Intensivkurs mit ausländischen Lektoren in Bollmannsruh.
A: Diethelm Trenner, Hertzstr. 83a, Falkensee, 1540

2. — 4. 11.
Wochenendseminar in Neubrandenburg. A: Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13/0202, Neubrandenburg, 2000.

8. — 30. 11.
Esperanto-Intensivkurse im EZH
EZH: Esperanto-Zentrum Halle, Schleiermacherstr. 37, Halle, 4020.

Doktoro Klauß pensis pri planlingvo — Nepublikigita manuskriptero de sciencfikcia romano

Kun Klaus Klauß, la aŭtoro de la sciencfikcia romano „Duelo sub fremda suno", mi interkonatiĝis en scienca arkivejo. La sciencisto bonvoleme subtenis miajn klopodojn trovi dokumentojn pri la rilatoj de famaj sciencistoj al Esperanto. Dum interparoladoj mi rimarkis profundan intereson kaj komprenemon por problemoj de la internacia lingva komunikado. Surprizite mi sciiĝis pri la ŝatokupo de doktoro Klauß — verkado de sciencfikciaj literaturajoj. Scivoleme mi demandis en librovendejo pri „Duelo sub fremda suno" (Militärverlag der DDR, Berlin 1985), sed nur kaŭzis rideton de la mirigita librovendisto. La aventura rakonto tuj ekkaptas mian atenton. Mi kuntravivas kosman flugon de homoj en estonta tempo al la dua planedo de la Barnarda sunsistemo Litennos kaj ilian laŭintencan kontaktiĝon kun tie vivantaj homsimilaj inteligentaj estajoj. Fascinas min ne nur la strecîga agado, sed ankaŭ la priskribo de la estonta homara socio kaj la pensoj de la ĉefpersonoj implikiĝantaj en la sociaj bataloj de la Litennanoj. La aŭtoro donas optimisman bildon de estonta socipolitika evoluo surbaze de venko de racio kaj moralo en la politika agado kaj diskutas konsiderojn kaj konduton de la spacveturantoj renkontiĝantaj fremdan kulturon sur Litennos. Por esperantisto tiu ĉi aspekto de la romano estas speciale interesa. Jam sur la unua paĝo la leganto ekscias, ke sur Tero estiĝis „mondkonfederacio, al kiu membras ĉiuj ŝtatoj kaj socialismaj kaj nesocialismaj". Aliloke estas klarigitaj „... principoj, sur kiuj baziĝas la rilatoj inter la en la ‚konfederacio' unuigitaj ŝtatoj: amika kaj intima kunlaboro surbaze de samrajteco kaj estimo de la historie kreskintaj specifaĵoj." (paĝo 30/31) La evoluon al tiu stato unu de la spacveturantoj eksplikas tiele: „Ŝtupon post ŝtupo, iom post iom, en diversaj tempoj sur la Tero unu popolo post la alia liberigis sin el la subpremo. Hodiaŭ preskaŭ ĉiuj popoloj de la Tero estas konstruintaj ordon, kiu ne plu karakteriziĝas per la malpaco inter diversaj grupoj de interesoj kaj potencoj, sed per intima kunlaboro de ĉiuj homoj, ĉar ili ĉiuj strebas al unu komuna celo." (paĝo 94) Ĉu ne la sekvaj vortoj el diskuto de la spacveturantoj pro aktualeco aspektas tre konate?: „Vi scias, la sento de la solidareco kun ĉiuj aliaj homoj, la venko super egoismo de la unuopulo, de la grupoj, de la diversaj ŝtatoj, la konscio, ke ni ĉiuj apartenas al komuna homaro, tio validas por ni kiel la plej grava rezulto de la grandaj revoluciaj renversoj de la lastaj cent kvindek jaroj." (paĝo 189) Do tiu ĉi sciencfikcia romano prezentas homaron, kiu sekve de la venka nova politika pensado sukcesplene povas labori por solvo de la plej urĝaj problemoj de sia vivado. Nature la aŭtoro tuŝas apud ekologiaj kaj aliaj homaraj problemoj ankaŭ la problemon de la internacia komunikado. La problemo aperas en du dimensioj. La homaro sur Tero ĝin solvis per uzado de mondlingvo. Sur Litennos „ĉiam estis ekzistinta nur unu sola lingvo". La spacveturantoj devas lerni ĝin. Aŭtomata tradukilo faciligas tion. „Li klopodis determini por ĉiu vorto de la mondlingvo la koncernan tradukon. Se temis pri vortoj, kiuj nomis objektojn, la interkompreniĝo sufiĉe bone funkciis. Sed se temis pri nomoj por abstraktaj nocioj la afero malfaciliĝis. Por certaj nocioj de unu lingvo ofte ne ekzistis koncernaj nomoj en la alia, devis helpi parafrazoj. Kiam Lorenz estis eltrovinta la tradukon de vorto, li unue enigis la nomon en la mondlingvon kaj poste la tradukon en la storon de la tradukaŭtomato. Se li poste malrapide parolis la enstorigitajn vortojn en la tradukilon, tuj la traduko eksonis el la parolaparato ... Evidentiĝis kiel ĉefa malfacilajo, ke la enloĝantoj de tiu ĉi planedo donis al multaj nocioj tute malsaman signifon ol la homoj." (paĝo 81)

Rilate al la mondlingvo ni nur informiĝas, ke ĝi estas „ĝenerale disvastigita". Doktoro Klauß malkaŝis al mi, ke en la unua manuskripto li pli konkrete

karakterizis ĝin. Laŭ mia peto li serĉis kaj feliĉe trovis la manuskripteron, kies unuafoja publikigo nun okazas en Esperanto:

„Sub liaj densaj grizaj brovoj la malhelaj okuloj rigardis zorgoplene. Vidalvide sidis Bert Heartfield, la vicprezidanto de la publika estraro de kosma flugado. Li estis mezgranda kaj maldika, kontraŭe al la enorma figuro de Dschaschwili li aspektis preskaŭ gracia. Li portis orkadritajn okulvitrojn. Lia vizaĝaspekto montris, ke li ne nepre konsentis la zorgojn de la prezidanto. ‚Mi kredas, mia kara Dschaschwili, vi senutile pripensas. Ĉio ja denove kaj denove estas priparolita, la decidon konsentas la tuta prezidio de la publika estraro de kosma flugado kaj la Supera Konsilantaro.'

Heartfield al Dschaschwili parolis per la mondlingvo, kiu en la internaciaj rilatoj akiris akcepton kiel ĝenerala interkomprenilo. La mondlingvo estis alte diferencigita kaj en la vortprovizo kaj en la gramatika strukturo, en la riĉeco de la esprimeblecoj eĉ superis la naciajn lingvojn. Ĝia klara logika strukturo faciligis ĝian finlernadon. Mondlingva Komisiono kontrolis la pluevoluigon de la lingvo, ĝian konstantan alkutimigon al la ŝanĝiĝantaj bezonoj de la scienca kaj kultura vivo. La malnovaj naciaj lingvoj apude nature estis konservintaj sian signifon por la naciaj teritorioj kaj por literaturaj artaj celoj.

Dschaschwili replikis memkompreneble ankaŭ en la mondlingvo: „Vi ja pravas. Sed la decidan respondecon tamen ni ambaŭ havas, ĉar ni havas la plej profundan trarigardon de la estantaj eblecoj, sed ankaŭ de la danĝeroj. Post kiam ni morgaŭ estas interparolintaj kun la kvin, la afero estos decidita. Ne plu ekzistas vojo reen."

Tiu ĉi ĝis nun nepublikigita manuskriptero evidentigas: doktoro Klauß pensis pri solvo de la lingva problemo per disvastigo de internacia planlingvo. Je mia demando li konfirmas, ke li jam delonge konvinkiĝis pri tio, ke nur per racia planlingvo oni profunde povas solvi la problemojn de la internacia lingva komunikado. Tiun konvinkon li jam havis kiam li dum prilaborado de la postlasaĵo de Wilhelm Ostwald sciiĝis pri Esperanto kaj Ido. Tiun konvinkon li ankaŭ hodiaŭ havas, kvankam en la publikigita formo de lia romano tio ne evidentiĝas.

Fritz J. Wollenberg

Floros la Rumana Esperanta Movado.

Pro tio ni bezonas helpon: Ni tre bone konscias, ke la Esperantaj organizoj ne estas riĉaj entreprenoj. Tial ni kuraĝas fari nur la jenajn sugestojn rilate al ebla helpo:

a) Bonvolu laŭebla inviti niajn gejunulojn al viaj sciencaj, kulturaj, primovadaj, turismaj aŭ lingvoperfektigaj aranĝoj ĉu naciaj, ĉu internaciaj. Tio gravege efikos en nia lando, kiu jardekojn mankis el Esperantujo. Nur post nekredeblaj fortostreĉoj kaj per afabla helpo de UEA de koncernaj landaj gastigantoj (hungaroj, bulgaroj, ĉeĥoj, poloj, GDR-anoj) kelkaj gestudentoj, laboristoj, lernantoj, junaj esploristoj povis partopreni eksterlandajn aranĝojn, eĉ UK-ojn (Varna – 1978, Budapeŝto–1983). La eĥo inter la aliaj gejunuloj estis grandega. Bv. sendi la invitilojn al KEI.

b) En la lastaj jardekoj, ni, rumanoj, eksciis nur hazarde, kio „laste aperis". Oni ricevis iujn librojn per la afableco de germanoj, hungaroj, bulgaroj, poloj, ĉinoj k. a., kelkajn revuojn (el GDR, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sud-Koreujo, Bulgario, la „Literatura(n) Foiro(n)". Mi kaptas la okazon por danki al prof. G. Waringhien, Bruno Vogelmann, Richard Schulz, Dr. sc. D. Blanke, Gigi Harabagiu, David Sandström, prof. O. Haszpra, R. Eichholz, E-grupo de Leverkuzen, K. Dodu kaj multaj aliaj por ilia helpo al nia movado en la 80-aj jaroj. Prof. d-ro Ignat Bociort, Kolektivo Esperanto kaj interlingvistiko, Universitato de Timisoara, Budevardol Pârvan 4. RO — 1900 Timisoara, Rumanio.

Ĉu perestrojko pereigos la unuecon de sovetiaj esperantisto?

Dum mia 9-monata stud- kaj esplorrestado en Sovetunio mi ne partoprenis la sovetian Esperanto-movadon, sed konatiĝis kun ĝiaj multfacetaj nuancoj, aktualaj problemoj, (mal) ebloj kaj perspektivoj. Mi estis invitita al Esperanto-aranĝoj de Moskvo ĝis Odeso, de Litovio ĝis Siberio, kio ebligis al mi propraokule ekkoni la movadon kaj ties anojn. Sovetunion mi forlasis kunportante antaŭ ĉio du ĉefajn impresojn: analoge al multaj nesolvitaj problemoj de la sovetia vivo, la reforma kaj liberaliga procezo sub glasnosto kaj perestrojko komplikis kaj konfuzis ankaŭ la situacion de la sovetia Esperanto-movado. Due, ĝiaj anoj, aliĝante al la gorbaĉova rekonstruo, enkondukis novan periodon de movada multformeco kun tendenco al skismo. La dua impreso estas certe tre pensiga.

La centrisma kaj totalisma regomaniero de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE, 1979 — 1989) neniam kapablis garantii harmonian kaj tolereman unuecon de la sovetia esperantistaro en formo de (kon)federacio. ASE ĉiam kontraŭstaris ĉian individuan organizemon, kiu ne povus esti kontrolata fare de la (moskva!) centro. Ĝi toleris ekzemple nur centre kontroleblajn respublikajn ASE-filiojn. Tiel ASE kiel fuŝnaskaĵo de la stagna periodo ne havis alian kapablon ol burokratiigi kaj degenerigi Esperanton en Sovetunio. Kvankam la aliĝo de ASE al UEA estis planata dum jaroj, ĝi neniam realiĝis. La preferon oni donis al la „fratiĝo" kun Mondpaca Esperantista Movado (MEM), malkovrante en UEA kvazaŭ kontraŭsovetian agenton.

La ribela febro en la sovetia Esperanto-movado eksplodis en oktobro 1988 per la refondo de Esperanto-Asocio de Estonio. Ĝia viruso tuj trafis la baltajn najbarojn: decembre estis restarigita la antaŭmilite likvidita Litova Esperanto-Asocio, dum sammonate la latvoj fondis sian propran Latvian Esperanto-Asocion. Per tiuj tri kuraĝaj paŝoj en Tallinn, Kaunas kaj Riga estis samtempe malglore entombigitaj la tri baltaj filioj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. La ostoj de la mano el Moskvo estis rompitaj. La litovoj jam sukcesis leĝe registrigi sian LEA-n kiel oficiale agnoskitan asocion en Litovio, kaj en Estonio kaj Latvio jam aperas Esperanto-bultenoj. Kiel memstaraj, sendependaj asocioj la tri organizaĵoj agas ekster la tutsovetia kadro. Tamen, estonta kunlaboro ne estas ekskludebla: „Estonte principe eblas aliĝo al ASE/SEU laŭ federaciaj aŭ konfederaciaj kondiĉoj, se estos senco kaj utilo tion fari, se finfine ASE/SEU komencos normale labori", signalis Povilas Jegorovas, unua vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio, ankoraŭ antaŭ la malfondo de ASE en januaro 1989.

La anticipa forkuro de la tri baltaj Esperanto-movadoj kaj la maltrankvileco kaj senpacienco ĉe la cetera sovetia movado, devigis ASE finfine lanĉi la du jarojn prokrastitan tutsovetian konferencon. Ekzakte 10 jarojn la asocio ekzistis kiel kolektiva membro de Societo de Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando (SSOD) sen esti alportinta grandan utilon al Esperanto en Sovetunio. La maltrafitan eblon fariĝi Landa Asocio de UEA neniam forgesis ĝiaj demokratiaj anoj. Ilia venĝo sekvis en januaro 1989.

(Vidu „der esperantist" 156 [4/89])

La bruaj debatoj dum la tritaga ASE/SEU-konferenco montris la nesuperrigardeblan amason de problemoj, kies solvado dum jaroj estis prokrastita. Kian organizstrukturon havu SEU? Multege da tempo perdis la delegitoj pro la diskuto pri federacio aŭ konfederacieco de SEU, sen trovi la definitivan respondon. Ĉu SEU estu memstara aŭ ĉu ĝi funkciu kadre de aŭ sub iu ŝtata instanco? Kvankam la plimulto de la delegitoj subtenis organizan sendependecon, la dilemo estis kompromise konkludita: ne aliĝi al, sed kunlabori kun konkretaj instancoj, emfazas la Konferenca Decidaro. La SEU-prezidio kun ties prezidanto V. Samodaj esperas, ke baldaŭ dekretota nova leĝo pri organizaĵoj en la lando reguligos la definitivan statuson de SEU. Daŭre ĝenaj estas la burokratio kun la disponigo de la papero por

aperigi periodaĵojn, la manko de kunvenejoj kaj monrimedoj. Kaj la granda obstaklo de la transpagaj problemoj kaj aboneblo de eksterlandaj gazetoj ankoraŭ ne povis esti solvita plenkontente. Nesufiĉaj kontaktoj kun la ekstera mondo izolis la esperantistojn en Sovetunio disde la cetera Esperantomovado.

Fakte, la pli granda ag- kaj decidlibereco en plu nekutime malferma politika etoso disigis la sovetiajn esperantistojn. Ilia senkompromisa diversopinieco surscenejigis konkurencajn organizaĵojn. Estas interese observi, ke ankaŭ en iliaj vicoj, glasnosto (la teorio) estas pli potenca ol perestrojko (la realigo de la teorio[j]). Ekzemple, grupeto da larĝvidaj homoj (kiel ili mem taksas sin), kritikante la mallarĝvidan SEU-decidon agi ekster la ŝtata ligo, antaŭvidis senesperan lukton por la SEU-registriĝo. En majo 27 Esperanto-kluboj el 4 respublikoj fondis TUEK, Tutsovetian Unuiĝon de Esperanto-Kluboj ĉe VNMC (VNMC estas eksperimenta sciencmetodika centro ĉe Kulturministerio de Sovetunio). Ŝajnas, ke la fondintoj de TUEK ankaŭ ne volas tute preteratenti SSOD-on, kies helpo interalie por faciligi eksterlandajn vojaĝojn estas utila.

La politikecan ludon partoprenas ne nur plenkreskuloj. Diverĝantaj starpunktoj ĉe la junuloj skismigas ankaŭ ilin. Fine de decembro 1988 venis la decido revigligi Sovetian Esperantistan Junularan Movadon (SEJM-2), SEJM-1 aperis en 1979, devante kontentiĝi je Junulara Komisiono de ASSE. Okaze de tendaro en 1988 la junaj esperantistoj konstatis, ke la tempo estas matura por reorganiziĝi pli efike. Tiu reorganiziĝo okazis en Siberio, 4 000 kilometrojn for de Moskvo, kie grupo de junuloj konstruas Junularan Esperanto-Centron (urbo Taŝtagol, distrikto de Kemerovo). Poste, januare en Moskvo okaze de la SEU-konferenco, oni ne volis rezigni pri Junulara Komisiono de SEU. Ĉu hazarde, ĉu malhazarde, la motoro de SEJM estas samtempe prezidanto de JK de SEU (A. Ananjin). Sed denove ne mankas minoritato, al kiu plaĉas nek SEJM nek JK de SEU. Gejunuloj apartenantaj al tiu frakcio naskis Fondaĵon de Esperantistoj Junularoj Arangoj (FEJA). Tiu jure agnoskita kreaĵo komprenis sin malpli asocio, pli produktanta entrepreno.

En Baltio, kun la fondo de baltlandaj asocioj instaliĝis ankaŭ koncernaj junularaj movadoj Dum en Estonio funkcias Junulara Komisiono de EAE, la litovaj gejunuloj preferas posedi memstaran organizaĵon: ĝi nomiĝas LEJL: Litova Esperantista Junulara Ligo. Oni povas atendi iliajn aliĝpetojn al TEJO. Kaj en aliaj respublikoj? La skeptiko montrita al tutsovetia federacio preferigas ankaŭ aliajn respublikojn posedi proprajn organizaĵojn. En marto fondiĝis en Minsk Belorusia Esperantista Unuiĝo kaj en majo aperis en Poltavo Ukrainia Esperanto-Asocio kaj reage al ĝi — kaj miru — Ukrainia Respublika Esperantista Unuiĝo. La duecon en Ukrainio klarigas la malkonkordo inter du rivalaj grupiĝoj. Dum la unua asocio sentas sin allogata de la respublika sindikato, la dua serĉas sian subtenon ĉe la kulturministerio. Restas Armenio[1]), Kartvelio kaj Uzbekio kun SEU-filioj, sed ankaŭ el tiuj regionoj registriĝis signoj de libereco ...

La emancipiĝo for de centra ligiteco estas observebla cetere ne nur sur respublika nivelo. En unuopaj urboj lastatempe anoncis sin novaj kaj renovigitaj organizaĵoj. Ili rifuzas entute enmiksiĝon de ekstere kaj vokas mem decidi al tiu tendenco aparteni kaj kun kiu fluo kunlaborì. Lige kun tiu evoluo naskiĝas Esperanto-perirodaĵoj: en Baku, kie la Esperanto-kooperativo „Luĉ", lanĉante la inform-reklamilon Sovetia esperantisto trovis partneron en Asocio de Azerbajĝanaj Ĵurnalistoj; en Uljanovsk/Sevastopol, kie kelkaj intelektuloj sub la nomo „Unuiĝo por Novtipa Kulturo" redaktas la revuon „Survoje"; en Uralo kaj Siberio, kie malnovaj periodaĵoj ricevas novajn impulsojn („Sezonoj" en Sverdlovsk, „Ekzakte" en Tjumen; „Aktuale" en Tomsk, „Eksciu ke ..." ... en Taŝtagol).

Fine, kelkaj statistikaj ciferoj (publikigitaj en 1988 de Informbulteno de ASE) donu konkretan bildon pri la nombro de la sovetianoj. Laŭ tiuj indi-

koj, en 1987 en 12 respublikoj ekzistis 116 kluboj kun 5 588 membroj Pli junaj ol 35 jaroj estas 62 %, membroj de la ŝtata junulara asocio Komsomolo estas 39 % kaj anoj de la komunisma partio estas nur 9 %. La nombro de kluboj kaj ties anoj intertempe certe kreskis; sole en Litovio nuntempe funkcias 36 societoj.
Restas konkludi, ke malgraŭ florado, Esperanto en Sovetunio ĉiukaze trovigas en organiza krizo. Kelkaj gvidaj aktivuloj montras sin optimismaj. Laŭ ili kelkajn jarojn post la ŝtormo regos trankvilo. Ili estas konvinkitaj, ke glasnosto kaj perestrojko ne plu estas renverseblaj. Kune kun la reformoj devige alvenos ankaŭ novaj leĝoj, kiuj definitivigos la statuson de Esperanto en la lando de la 100 popoloj. Sed ĝis tiam la esperantistoj ankoraŭ esperas ...

[1]) Intertempe fondiĝis Armena Esperanto-Asocio, la red.

Andy E. Künzli (Svislando)
[El „Esperanto" 11/89]

Lektoroj en Bad Saarow

La 1-an de februaro 1990 la grupo de lektoroj instruantaj Esperanton en Universitatoj kaj altlernejoj de GDR, renkontiĝis en Bad Saarow por revui la aktualan klerigopolitikan situacion en la altlernejoj de GDR kaj por interŝanĝi spertojn laŭ la donita superrigardo. Dum la printempa semestro 1990, Esperanto-kursoj funkscias en jenaj altlernejoj de GDR: Pedagogia Altlernejo Magdeburg (s-ro Hocke), Teknika Universitato Magdeburg (s-ino Häusler), Universitato Halle (s-ino Mattusch), Teknika Universitato Dresden (d-ro Schwarz), Teknika Altlernejo Ilmenau (d-ro Rogazewski), Universitato Jena (s-ino Schroth), Pedagogia Altlernejo Leipzig (d-rino Fiedler).
Do entute 8 kursoj. Tamen, la kursoj estas nur malgrandaj (ĉ. 5 personoj) kaj necesas sistema varbado inter studentoj.

„Die Esperanto-Jugend"

„La Esperanto-Junularo" (de GDR, ankoraŭ), nomiĝas la nove fondita esperantista junulara organizo de GDR. Surbaze de la aktiva porjunulara agado de GDREA dum la pasinteco evoluis sufiĉe vigla aktivularo, kiu pli kaj pli memstare agadis. Sendube kulmino estis la granda centra junulara esperantista renkontiĝo 1988 en Biesenthal (kp. de 6/88).

Nu, venis la profundaj sociaj ŝanĝoj en GDR haj la esperantistaj junuloj sukcesis eĉ „sidi" ĉe la „ronda tablo" de la junularo en Berlin, t. e. demokratia diskutforumo pri junulara politiko en GDR kun influo je decidoj.

Fakte okazis mirindaĵo: La junaj esperantistoj eĉ ricevis oficejon en la domego de la Libera Germana Junularo (FDJ), kiu nun apartenas al diversaj junularaj organizoj. La 7-an de aprilo 1990 fondiĝis do fine „La Esperanto-Junularo". GDREA deziras al la nova organizaĵo sukceson.

La adreso: Die Esperanto-Jugend (DDR), Unter den Linden 36—38, Berlin, DDR — 1086, Telefono 2 23 15 64

Haveblas „La danĝera lingvo"

Jus aperis en Moskvo (eldonejo „Progreso") la dua eldono de la titole menciita furora libro de Ulrich Lins (kp. „der esperantist" 2/1990). La originala eldono (broŝurita, 546 p. kostas ĉe UEA 66 guldenoj = 58 DM). La moskva eldono estas fortike bindita kaj krome enhavas postparolojn de S. N. Kuznecov kaj D. Blanke (568 p.). Ĝi kostas 50 DM. Mendojn akceptas D. Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113—05, Berlin, 1141 aŭ GDREA.

Ekde 1959 tra la etero

De 1959 ĝis 1990 seninterrompe, do pli ol 30 jarojn, Radio Polonia disaŭdigas elsendaĵojn en Esperanto. Sur la foto: redaktoro Andrzej Pettyn kaj Milana Svedo. Petu informfolion pri ĉiuj esperantlingvaj elsendoj en la mondo ĉe la Centra Estraro de GDREA.

Koverto pri Erošenko

La sovetia poŝto eldonis koverton omaĝe al la „rusa-sovetia verkisto, klerigisto, esperantisto V. J. Erošenko (1890 — 1952)". Li estis blinda, kaj liaj verkoj aperis i. a. en la rusa, japana kaj en Esperanto. La koverto ne nur montras la portreton de la verkisto sed ankaŭ la supre cititan tekston en Esperanto kaj la rusa. Krome videblas tri libro-titoloj en la japana, rusa kaj en Esperanto („Rakontoj de Erošenko"). La koverto eldoniĝis dank' al la klopodoj de la sovetia esperantisto kaj filatelisto Leo Vulfoviĉ (Moskvo), kiu dum oktobro restadis du semajnojn en GDR (Karl-Marx-Stadt, Berlin, Schwerin, Stralsund, Rostock).

Movadhistorio: Likvido de sovetiaj esperantistoj

Mi havis la esceptan eblon vidi dokumentojn aŭtentikajn. Estis unusence konstateble, ke — kontraŭe al la ĝisnunaj asertoj — en 1937 — 38 gvidantoj de SEU estis kondamnitaj pro nura esperantista agado. La akuzo plej ofte estis partopreno en „esperantista-trockisma", fojfoje „esperantista-cionisma" spionorganizo, plej ofte spionado por Germanio, kelkfoje por Latvio kaj Anglio. Ankaŭ ĝis nun ne estis certe, ĉu la koncernuloj restis vivaj. Sed nun estas konataj ankaŭ la datoj de ilia ekzekuto. Kelkaj el ili:

Ernest Drezen, gvidanto de SEU, 1937-10-27,
Vladimir Varankin, historiisto, romanisto, redaktoro, 1938-10-03,
Gerbert Muravkin, 1937-12-11.

Tiuj datoj estas konataj ankoraŭ eĉ ne por la familianoj. La ekzekutoj pro Esperanto — kun malmultaj esceptoj — koncernis homojn el Moskvo, Leningrado kaj Ukrainio. Aliaj alitempe kaj aliloke estis kondamnitaj plejparte ne rekte pro esperantista aktivado (krom en la Baltaj respublikoj). La rehabilitado kutime okazis en 1957 — 58; la juĝoj estis nuligitaj pro manko de krimo. (Ekzistas ankaŭ esceptoj: ekzemple Ŝnejer Trevas, mortigita 1938-10-1, estis rehabilitita nur la 12an de decembro 1988.) La rehabilitadoj ĝis nun estis sekretaj, tiel eĉ la familianoj ne informiĝis pri ili

El: Á. Rátkai, Sovetia Esperanto-Panoramo. En Budapeŝta
Inf. 227/228, 1989

Kvin tradukoj de Heine-poemo

Jen por via komparo ni prezentas al vi kvin tradukojn de la fama poemo de Heinrich Heine „Pinarbo". Post la tradukoj de Zamenhof, Döring, Pillath kaj Kalocsay, la ĉina esperantisto Zhou Liuxi (Licius) faris la kvinan, kiu aperis en la ĉina revuo „La Mondo" 6/89 (organo de Ĉina Esperanto-Ligo). La aliajn kvar tradukojn ni ĉerpis el G. Waringhien, Eseoj I (Beletro), La Laguna: Régulo 1956, p. 64 — 67.

Jen unue la germana originalo.

Ein Fichtenbaum steht einsam
im Norden auf kahler Höh'.
Ihn schläfert; mit weißer Decke
Umhüllet ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,
Die, fern im Morgenland,
Einsam und schweigend trauert
Auf brennender Felsenwand.

La traduko de Zamenhof:

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

La traduko de Döring:

Abio altleviĝas
Sur norda mont' izola;
Ĝi dormas, dum ĝin kovras
Glaci' kaj neĝo mola.

Ĝi sonĝas pri la palmo,
Staranta en orient'
Sur roko sunbrulanta,
Funebre, en silent'.

La traduko de Pillath (Zanoni):

Pinarbo staras sola
En nordo, sur nuda altaĵ'.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaj'.

Sonĝadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo,
En maldolĉega silent'.

La traduko de Kaloscay:

Pinarbo staras norde
Sur kalva mont', en sol'.
Ĝi dormas; glacio, neĝo
Ĝin kovras per blanka tol'

Kaj sonĝas ĝi pri palmo,
Kiu en suda land',
Sola, funebra, mutas
Sur arda, altroka rand'.

Nia ĉina amiko skribas pri sia poem-traduko: La laŭdata traduko de Kalocsay devias de la originalo je 12 lokoj, dum mia traduko nur je 5 lokoj". Do jen la

kvina traduko de Zhou Liuxi:

Pinarbo staras sola
en nordo sur nuda monteĝ'.
Li dormas; per blanka kovro
envolvas lin frost' kaj neĝ'.

Li sonĝas unu palmon:
ŝi, fore en orient',
soleca mornas sur roko
brulanta, kaj en silent'.

Jen interesa kompara materialo por ŝatantoj de poemoj.

Avineto Luno. Leporo perdis la vojon. Ĉinaj fabeloj. Tekstoj de Lin Songjing, bildoj de Ĝang Ĝjiping. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 20 paĝoj.

Du ĉinaj fabeloj en malgranda multkolora libro laŭ la kutima fabela prezentado de Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ambaŭ historietoj estas tre mallongaj, facile kompreneblaj eĉ por etetaj infanoj de du-tri jaroj, kaj edukcelaj. Nova por niaj infanoj estos certe la personiĝo de la luno ne kiel viro, sed kiel maljuna virino, desegnita kun sulketoj ĉe la frunto, diketaj vangoj kaj hartubero. Entute tre ĉarma libreto.

U. Becker

Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo
Vol. II. Esperantismo La Laguna: Universidad de la Laguna 1987, 790 p.

Juan Régulo Pérez fariĝis 70-jara en la jaro 1985. Li estas unu el la modernaj pioniroj de la esperanta eldonarto, fondis la eldonejon „Stafeto" en La Laguna (Kanariaj Insuloj, Hispanio) kaj multe influis tutan generacion de esperantistaj intelektuloj. Sed ne tro konatas la fakto inter esperantistoj, ke prof. d-ro Juan Régulo ankaŭ estas elstara lingvisto, rigardita kiel „vera animo de la universitato de La Laguna". Post 40-jara laboro kiel profesoro pri la historio de la hispana lingvo kaj pri Esperanto, la universitato decidis honori sian filon okaze de la 70-a vivojubileo per eldono de festlibro. La eĥo de la incititaj kontribuantoj estis tiom granda, ke ne unu sed kvar (!) ampleksaj volumoj formas la festlibron. La dua volumo, kiun ni ĉi-tie prezentas estas fakte antologio de la nuntempa interlingvistiko kaj esperantologio. Recenzo simple ne eblas, ĉar necesus ege ampleksa analizo. Pro tio ni bedaŭrinde devas kontentigi nin per listigo de tiu abundega enhavo:

André Albault:
La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo
Paul Ariste:
Liva poezio en Esperanto
William Auld:
Kulturbazo historia de la Esperanto-Movado
Julius Balbin:
Kial mi verkas Esperante?
Vilmos Benczik:
La rolo de la eldonejo STAFETO en la konservado de la kontinueco de la Esperanta literaturo
Roger Bernard:
Esperantaj kabaretoj
Detlev Blanke:
Pri la termino planlingvo
Werner Bormann:
Mondlingvo longperiode
Marjorie Boulton:
La barlastona travivajo: saturada metodo de lingvolernado, rilate al Esperanto
Probal Daŝgupto:
Adverboj en Esperanto
Fernando de Diego:
Genezo kaj traduk-problemoj de la Esperanta Don Quijote . . .
Michel Duc Goninaz:
Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj
Aleksandr Duličenko:
K principam sozdanija istorii Lingvoprojektirovanija
Rüdiger Eichholz:
Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado
Tadeusz Ejsmont:
Nuntempo kaj Esperanta idearo
Peter G. Forster:
Some Social Sources of Resistance to Esperanto
Helmar Frank:
Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo
Aldo de' Giorgi:
La rolo de eldonistoj en la Esperanto-Movado kaj la krizo de la Esperanta poezio post STAFETO
Bernard Golden:
Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj
Reinhard Haupenthal:
Albert Schramm (1880 — 1937). Ein vergessener Esperanto-Pionier
Itô kanzi: la unua unua unua libro
Naokazu Kawasaki:
A) Fremdaj vortoj en Antaŭparolo de Unua Libro. B) Propraj nomoj en Ekzercoj de Dua Libro
Leopoldo Henrique Knoedt:
La oreloj de Profesoro Juan Régulo Pérez
Edwin de Kock:
La Regula STAFETO kaj la originala Esperanta poezio
Boris Kolker:
Kontribuo de la rusa lingvo al la verba sistemo de Esperanto
Jiří Kořínek:
Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka
Ivo Lapenna:
Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al la Esperantlingva jura terminologio
Ulrich Lins:
La baraktado de IPE. Ĉapitro el la historio de la laborista Esperanto-Movado
Marie Thérèse Lloancy:
Les jeux de mots de Raymond Schwartz dans trois ouvrages en Espéranto publies par STAFETO: La Zamenhofa Esperanto, Kiel akvo de l'rivero et . . . kun siaspeca spico!
G. F. Makkink:
Pri la artikolo en Esperanto
Stefan Maul:
Ĉu eblas revoluciigi la internacian informsistemon helpe de la Internacia Lingvo Esperanto?
Geraldo Mattos:
Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto
Miyamoto Masao:
Juna Régulo Pérez kaj la Esperanta originala literaturo
Ljubomir Miñajlov:
Pri unu provo de kritiko kontraŭ Plena Analiza Gramatiko de Esperanto
Nagata Akiko:
Lingvikaj vortoj de Esperanto el la Vidpunkto de Japanlingvano
Paul Neergaard:
Plantonomoj en la Lingvo Internacia
Vlastimil Novobilský:
Kontribuo de ĉeĥaj verkistoj al la Esperanta literaturo
Violin Oljanov:
La Plena Analiza Gramatiko de Esperanta
Manuel de Paz Sánchez:
Masoneria canaria y esperanto
Fabrizio A. Pennacchietti:
Kaŝaj kaj malkaŝaj refleksivaj prefiksoidoj en Esperanto
Karolo Pič:
Simpozio pri -ata/-ita
Wouter F. Pilger:
Problemoj de esperantigo de nederland (lingv)-aj loknomoj

Claude Piron:
Esperanto, formo de humanismo
Baldur Ragnarsson:
Esperanto kiel anti-lingvo
Olav Reiersøl and Richard E. Wood:
A Comparison of the Use of Some Suffixes in Esperanto and English
Hugo Röllinger:
Esperanto- kaj Zamenhof-objektoj (stratoj, bulvardoj, placoj, monumentoj k. s.)
Johan Hammond Rosbach: Dedalo kaj Ikaro
Reto Rossetti:
Bernard Shaw on the Question of an International Language in Correspondence with Reto Rossetti (1949 — 1950)
Josef Rumler:
Koncepto pri la diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la Esperanta leksiko
M. H. Saheb-Zamani:
Irano, Islamo kaj la supernacia lingvo — Esperanto
Carl Støp-Bowitz:
Biologiaj nomenklaturoj kaj ilia esperantigo
Humphrey Tonkin:
Esperanto: kulturo, lingvo, historio
Henri Vatré:
Vort-statistikaj esploroj ĉe 15 novelistoj
Alex Venture:
La historio de la Esperantaj lingvaj institucioj
W. A. Verloren van Themaat:
Kriterioj por la internacieco de la vortaro en planlingvoj
Gaston Waringhien:
25 jaroj el la vivo de esperantista eldonejo
John C. Wells:
Hispanaj kaj anglaj problemoj en la prononcado de Esperanto
Peter Zlatnar:
La internacia lingvo Esperanto en la lerneja sistemo de lingvo-instruado — Spertoj en Jugoslavio

D. B.

Tiu prezento de unu el la kvar volumegoj, eldonitaj omaĝe al la plenmerita prof. d-ro Régulo Pérez, aperas postdate honore al la jubileulo, kiu festis sian 75-jaran naskiĝjubileon la 30-an de marto 1989.

La redakcio

Grava titolo pri interlingvistiko

En la tutmonde tre renoma eldonejo por lingvistiko, Mouton/de Gruyter (Berlin — New York) jus aperis jena titolo: **Klaus Schubert (Ed.): Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages. (Trends in Linguistics-Studies and Monography 42). Berlin — New York: Mouton/de Gruyter, 1989, 348 p.**
Do la titolo en Esperanto: „Interlingvistiko. Aspektoj de la scienco pri planlingvoj". La enkrampe menciita titolo koncernas la lingvistikan libroserion, al kiu la libro apartenas. Jen la anglalingvaj originalaj titoloj de la 18 ĉapitroj:

Part I: Introductions

— André Martinet: The proof of the pudding
— Klaus Schubert: Interlinguistics — its aims, its achievements, and its place in language science

Part II: Planned Languages in Linguistics

— Aleksandr D. Duličenko: Ethnic language and planned language
— Detlev Blanke: Planned languages — a survey of some of the main problems
— Sergej N. Kuznecov: Interlinguistics: a branch of applied linguistics?

Part III: Language Design and Language Change

— Dan Maxwell: Principles for constructing Planned Languages
— François Lo Jacomo: Optimization in language planning
— Claude Piron: A few notes on the evolution of Esperanto

Part IV: Socio Linguistics and Psycholinguistics

— Jonathan Pool — Bernard Grofman: Linguistic artificiality and cognitive competence
— Claude Piron: Who are the speakers of Esperanto?
— Tazio Carlevaro: Planned auxiliary language and communicative competence

Part V: The Language of Literature

— Manuel Halvelik: Planning nonstandard language
— Pierre Janton: If Shakespeare had written in Esperanto . . .

Part VI: Grammar

— Probal Dasgupta: Degree words in Esperanto and categories in Universal Grammar
— Klaus Schubert: An unplanned development in planned languages

Part VII: Terminology and Computational Lexicography

— Wera Blanke: Terminological standardization — its roots and fruits in planned languages
— Rüdiger Eichholz: Terminics in the interethnic language
— Victor Sadler: Knowledge-driven terminography for machine translation
— Index

La titolo estos trovebla en ĉiuj iom grandaj bibliotekoj, kiuj sekvas la lingvistikan fakliteraturon. La konata serio „Trend's in Linguistic Studies and Monographes" estas sekvata de multaj seriozaj lingvistoj.
Tiu libro estas plua paŝo al ĝenerala akceptigo de interlingvistiko en la oficialaj lingvosciencaj medioj. D-ro Klaus Schubert, kiu redaktis la volumon, estas la vicdirektoro de la duonaŭtomata tradukprojekto DLT ĉe BSO en Utrecht/Nederlando.
(Traduko de la titoloj: Enkonduko: Martinet — Lo provo de la pudingo (= la provŝtono), Schubert — Interlingvistiko, ĝiaj pretendoj, atingoj kaj loko en la lingvoscienco.

II. Planlingvoj en lingvistiko: Duličenko — Etnolingvo kaj planlingvo, D. Blanke — Planlingvoj — superrigardo pri kelkaj ĉefaj problemoj, Kuznecov — Interlingvistiko — branĉo de aplikita lingvistiko?

III. Lingva plano kaj lingva ŝanĝo: Maxwell — Principoj por konstruado de planlingvoj, Lo Jacomo — Otimumigo en lingva planado, Piron — Kelkaj notoj pri la evoluo de Esperanto.

IV. Socilingvistiko kaj psikolingvistiko: Pool/Grofman — Lingvistika arteco kaj kognitiva kompetenteco, Piron — Kie estas la parolantoj de Esperanto?, Carlevaro — Planita helplingvo kaj komunika kompetenteco.

V. La lingvo de Literaturo: Halvelik — Planado de nenorma lingvo, Janton — Se Shakespeare estus skribinta en Esperanto.

VI. Gramatiko: Dasgupta — Gradaj vortoj en Esperanto kaj kategorioj en la Universala Gramatiko, Schubert — Neplanita evoluo en planlingvo.

VII. Terminologio kaj komputa leksikografio: W. Blanke — Terminologia normigado — ĝiaj radikoj kaj fruktoj en planlingvoj, Eichholz — Terminoradikoj en la interetna lingvo, Sadler — sciostirita terminografio por maŝina traduko. Indekso).
La libro estas mendebla ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, 120 guldenoj.

GEJ seminariis

Pri la Internacia Seminario de GEJ (Germana Esperanto-Junularo) de la 27-a de decembro 1989 ĝis 3-a de januaro 1990, en kiu partoprenis 340 junuloj el 30 landoj (inter ili ĉ. 20 GDR-anoj), skribis al „de" Karin Walz:
La Internacia Seminario (IS) de GEJ havas jam longan tradicion. Inter Kristnasko kaj Novjaro kiel ĉiam ĝi ĉi-jare okazis en Neumünster — malgranda urbo en Schleswig-Holstein (norda parto de FRG).
La IS — konata kiel unu el la plej gravaj ĉiu-jaraj renkontiĝoj — estas fama pro siaj altnivelaj programoj kaj bona organizado.
Ĉi-foje la ĉeftemo estis: „„Sovetunio". Dank' al la nunaj favoraj politikaj cirkonstancoj multaj sovetianoj kaj aliaj orienteŭropanoj, inter ili kelkaj GDR-anoj, ŝukcesis veni.
Rapide reaginte oni ofertis al ni amasloĝejojn en gimnastikejo — ne tre komfortaj, sed sufiĉe taŭgaj. La ĉiutaga programo konsistis ĉefe el prelegoj kaj diskutoj, sed ankaŭ el sporto, muziko, dancado, amuzado kaj tre bela ekskurso al la fama urbo Lübeck. Jen kelkaj temoj, pri kiuj ni ofte kaj longe debatis:
— sovetia politiko
— la fenomeno de Stalin kaj la Hitler-Stalin-pakto
— lingva situacio, kunvivado de la sovetiaj popoloj, la judoj en Sovetunio
— la planekonomio
— Ĉu unuiĝo de ambaŭ germanaj ŝtatoj?
Krome okazis diversaj lingvokursoj: Esperanto por komencantoj, enkonduko en la rusan kaj estonan lingvojn.
Kulturaj aranĝoj plenigis la vesperojn. La nederlanda grupo KAJTO entuziasmigis nin per nederlanda popola muziko kaj dancado. Aparte rimarkinda laŭ mi estas la teatra vespero. La teatra grupo de GEJ prezentis „Kato sur varma ladotegmento" (tradukita el la angla) de Tennessee Williams. Pensiiga, konsterniiga teatraĵo pri la ruinigitaj interrilatoj de iuj usonaj familianoj. Dum la spektaklo miaj nervoj estis sufiĉe streĉitaj pro diversaj emocioj. Mian respekton al la aktoroj, kiuj plejparte apartenas al la GEJ-estraro. La Novjaron ni salutis per ĉampano kaj dancado kun multe da ĉirkaŭbrakumado kaj bondeziroj. Tiu sukcesa JS eble estis malgranda paŝo sur la vojo de ĝenerala kompreniĝo, toleremo kaj estimo inter la popoloj.

Karin Walz

Lernu ludante!

Ne okazas ofte, ke ekstermovada firmao produktas rimedon por helpi la instruadon de Esperanto. Tamen tion faris en Hungario la presejo Pannon Nvoma en urbo Veszprem: ĝi produktis proprariske instruhelpilon kun la nomo „Kreito".
La lingva ludilo troviĝas en libroforma skatolo, bele kaj firme kovrita samformata kaj preskaŭ samdika kiel la Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi enhavas kartetojn kun la dimensioj de 6 x 3,5 cm, sur kiuj estas presitaj aparte ĉiuj afiksoj, prepozicioj kaj 200 + 400 vortoj. En la skatolo troveblas ankaŭ broŝureto, kiu kvinlingve (Esperante, hungare, germane, hispane kaj angle) informas pri la uzado de la lingvoludilo por komencantoj. Por progresantoj nur Esperante legeblas la informoj pri maniero de taksado kaj ses diversaj proponitaj ludmanieroj. Aparta ĉapitro priskribas la 16 regulojn kiel bazon de gramatiko. Kaj fine troveblas listo de 200 plus 400 vortoj, kies signifon la uzantoj povas enskribi en sia propra lingvo.
Uzante la 770 vortokartetojn kaj afiŝkartojn oni povas lerni la vortojn kaj pliperfektigi la lingvoscion. Ekzemple oni tiras 5 vortojn, per kiuj — uzante la afiksojn kaj prepoziciojn — eblas fari plurajn frazojn. Sed ne gravas, ĉu la frazo havas sencon aŭ ne, gravas nur, ke gramatike ĝi estu perfekta. Tio helpas perfektigon de la lingvouzo, samtempe la strangaj frazoj ĉiam amuzas la kunludantojn.
Per unu kompleta lingvoludilo povas ludi 4-5 gelernantoj. Uzante plurajn ludilojn ankaŭ en lernejaj klasoj eblas instrui per ĝi.
La valoron de la alloga lingvoludilo iom malaltigas tiuj kelkaj lingvaj kaj preseraroj, kiuj troveblas en la informbroŝureto. „Kreito" estas akirebla kontraŭ 28,50 guldenoj ĉe libroservo de UEA.

Ilona Sirko

J. Delĉeva-Pejkova, Kontribuo de Bulgara Kooperativo al la Monda Kooperativa Movado. Eld. Kooprogres ĉe Centra Kooperativa Unuiĝo, Sofia, 1987, 28 p. Trad. V. Baleva.

Bulgaraj kooperativoj ekzistas jam dum preskaŭ cent jaroj. Dum la jardekoj ili kreskis al potenca amasa organizajo kiu esence influas la ekonomian kaj socialan evoluon de sia lando. Samtempe ĝi realigas rimarkindan internacian kunlaboron kun kooperativaj movadoj en ĉiuj partoj de la mondo kaj kun internaciaj organizajoj.
La teksto de la broŝuro estas referaĵo farita dum la kvara Internacia Kooperativa Esperantista Konferenco en julio 1987 en Varsovio, dum la jubilea Universala Kongreso de Es-

peranto. La aperigo de la broŝuro estas samtempe daŭrigo de malnova tradicio de Centra Kooperativa Unuiĝo de Bulgario eldoni en la internacia lingvo.
Petu la broŝuron senpage ĉe: Kooperativa Esperanta Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, 1303—Sofio, Bul. „Hr. Botev" 97, Bulgario. Kooperativa Esperanta Sekcio atendas opiniojn pri la temoj tuŝitaj en tiu ĉi eldonaĵo.

U. Becker

Ĉinaj tradicaj Festoj. Ĉji Šing. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1987. 124 paĝoj, ilus. Serio „Feniksa Libraro"

Se ankaŭ vi, kara leganto, ankoraŭ hodiaŭ en la periodo de la kosmonaŭtoj ŝatas ĉarmajn legendojn, mi rerakontu unu al vi: „En la pratempo estis dek sunoj, kies lumo brilis kiel fajro, ke la maroj bolis, la montoj disfalis, la tero fendiĝis, la herboj kaj arboj velkis, kaj la popolo ne trovis lokon por rifuĝi. Tiam Hoŭji per lerta pafado paffaligis en unu spiro naŭ sunojn, lasante nur unu. Li forigis la katastrofon por la popolo. Pro tio la tuta popolo amis lin kaj elektis lin kiel reĝon . . ."
Ĉi-rakonto kune kun multaj aliaj samĉarmaj legeblas en la libreto „Ĉinaj Tradiciaj Festoj" de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.
Kun amuzo kaj interesego mi preskaŭ seninterrompe tralegis la libreton. Kiel mezeŭropano mi ja ĉiam sentas min allogita se temas pri la fora, fremda Ĉinio neniam vizitita kaj verŝajne neniam vizitota de ĉiuj miaj familianoj. Sed foreco kaj fremdeco de la priskribita lando tute ne estas la solaj kaŭzoj rekomendi ĉi libreton, kiu ravas la leganton per agrabla rakontmaniero. Ĉu eblas rekoni la ĉinajn proprajn nomojn transskribitajn esperantlitere en aliaj literaturaĵoj, mi ne testis. Mi ĝojis pri la teksto flue legebla, sciante ke ĉiu ĉinlingva vorto transliterita per latindevenaj literoj povas esti nur pala imito de tiu, elparolita de ĉina buŝo.
La leganto trovas en ĝi krom ĉarmaj legendoj ankaŭ multajn faktojn pri la historio, la moroj, vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Per la pleje — tamen ne tro rigore — uzita vico de „deveno de la festo, moroj, manĝaĵoj" kaj la aldonita kronologia tabelo ĝi ne nur aspektas, sed certe ankaŭ servas kiel enciklopedieto.
Kvankam Ĉinio estas tiel fora, fremda lando mi aliflanke trovis multajn similaĵojn inter la ĉinaj kaj germanaj moroj. Temas ekzemple pri „ne dormi dum la tuta jarfina nokto", pri „eksplodigi petardojn kaj bondeziri unu la alian dum la novjara festo", pri la fastoĉesa festo iomete simila al nia Pasko aŭ pri la moro flugigi kajtojn. Ĉu vi jam sciis, ke kajto unue estis milita instrumento invitita ĉirkaŭ 400 a. K.? La legendon pri la bovisto kaj la teksistino, "tre populara en Ĉinio kaj bone konata preskaŭ de ĉiuj" mi ankaŭ ne malkaŝu.
Provinte elekti iom por atentigi vin pri ĉi leginda verko, mi fine aldonu, ke mi ne nombris la malmultegajn preserarojn. La lingvo estas relative facila, taŭga por progresintoj kaj parte eĉ por komencantoj. Nur malmultaj vortoj mankis en mia poŝvortaro. Certe mi uzos kelkajn rakontojn en mia venonta komencanto-kurso.
Kelkaj moroj kaj ankaŭ malmultaj legendoj estas tro kruelaj laŭ mia gusto, sed ankaŭ niaj germanaj fabeloj ja ofte estas sangoplenaj.
Traleginte ĝin, vi certe konsentos kun mi, ke la plej alloga festo por rigardi ĝin estus la Lanterna Festo, ĉu? **André Weber**

Kial Leporoj Havas Mallongan Voston? Granda Pando Vizitis Mian Hejmon

Ĉu esperantistoj aŭ ne, ĉiuj volonte foliumas en ĉinaj esperantlingvaj infanlibroj. En la mondo aperas diversspecaj esperantaĵoj, sed nur la Ĉinan Esperanto-Eldonejon karakterizas la celo kontinue aperigi literaturon por la plej juna legantaro. Jam aperis kelkdek libretoj por la 3 ĝis 7 jaruloj. Al tiuj eldonaĵoj apartenas ankaŭ „Kial Leporoj Havas Mallongan Voston? ‚kaj' Granda Pando Vizitis Mian Hejmon". La unua estas verkita de Šju Gŭangju kaj desegnita de Liŭ Ĝjijoŭ, ĉe la dua mankas tiuspecaj indikoj.
Esperantistoj ofte spertas, ke ĝuste tiu literaturo (rimaĵoj, ritmoj, versaĵoj, rakontoj), kiu estas la unua ludaŝerca travivaĵo de la infano por ekkoni la belecon de lingvo, preskaŭ tute ne troveblas en Esperanto. Ĝojiga estas, ke almenaŭ la infanĝardenaĝuloj povas konatiĝi kun la literaturo en la formo de tiuj fabeloj. Oni povas diskuti, ĉu la temoj kaj la arto de la rakontoj por la eŭropa pensmaniero konvenas aŭ ne; tamen tiuj ĉi verketoj estas tre ŝatataj de la infanoj. Ili havas bone kompreneblajn tekstojn, ĉiu paĝo estas ilustrita per arte faritaj bildoj.
La temo de ambaŭ verkoj estas elektita el la vivo de la bestoj. „Kial Leporoj Havas Mallongan Voston?" respondas la titoldemandon; „Granda Pando Vizitis Mian Hejmon" rakontas, kiel oni sanigis malsanan pandidon.
La librojn mi proponas al ĉiuj esperantistoj, kiuj volas kontaktigi siajn infanojn kun Esperanto, sed ankaŭ por komencantoj ili estas konvenaj helpiloj, ĉar legante la rakontojn per la helpo de la bildoj, rapide venas la ĝojo pri la kompreno de la enhavo.

Erika Bartos

La 7-a plenkunsido de la Centra Estraro

Ĝi okazis la 12-an de majo 1990 en Woltersdorf ĉe Berlin. La Estraro pritraktis la rezultojn de la ekstervica kongreso de Kulturligo, resumis la aktualan situacion de GDREA kaj traktis detale projekton de nova statuto de GDREA. La prezidio informis pri la kontaktoj kun Germana Esperanto-Asocio.
La informoj kolektitaj dum ĉi tiu plenkunsido montris tre ĝoiige, ke GDREA estas stabila, ke la membroj, krom malmultaj esceptoj, ne forlasas sian organizaĵon kaj ankaŭ ne vidas kialon forlasi Kulturligon. Entute optimismiga kunsido. Tamen — la estonteco montros . . .

Skribu al Radio Polonia

Ĉar ŝanĝiĝis la ondolongoj de la Esperantaj disaŭdigoj de Radio Polonia, skribu al la redakcio kaj petu la aktualan informilon laŭ la adreso: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PI-00-950-Warszawa, Pollando.

KORESPONDDEZIROJ

GDR

F-ino Kathrin Krause (22j.) dez. kor. pri E.-movado, vojaĝoj, arkitekturo, muziko. Adreso: Kleine-Ring-Str. 18, **Finsterwalde, 7980.**

S-ro Jörg Philipp, Grünstr. 9, **Senftenberg, 7840,** dez. kor pri vajaĝoj, literaturo, fotografaĵoj.

S-ro Lutz Brüders, dez. kor. pri literaturo, foto, vojaĝoj, E.-movado. Adreso: Bierbachstraße 54, PF 53-34, **Zella-Mehlis, 6060.**

F-ino Kathrin Jauch, J.-Gagarin-Str. 50, **Altenburg, 7400,** dez. kor. pri muziko, literaturo, politiko, E.-movado.

S-ino Ramona Kunze, Nr. 20b, **Nechern, 8601,** dez. kor. pri hundoj, literaturo, muziko.

Wolfgang Hehl, PF 3652, **Gardelegen 3570,** dez. kor. pri vivo kaj kutimoj en div. landoj.

S-ino Ines Große, 27j., instruistino, dez. kor pri kutimoj de la homoj el diversaj landoj kaj turismo. Adreso: Rudolf-Liebold-Str. 13, **K.-Marx-Stadt, 9075.**

S-ro Friedrich Schleicher, 50j., dipl.-inĝ. (Nr. 45, **Rhäsa, 8251),** dez. kor. spec. pri homoj kaj naturo, ĉiutaga vivo, muziko.

19-jara studentino dez. kor. pri vojaĝoj, literaturo, politiko, naturo, sporto: Andrea Kleeberg, Volkradstr. 29, **Berlin, 1136.**

D-ro Rainer Berthelmann, Steinweg 54, **Halle, 4020,** dez. kor. pri lingvoj, fremdlingva instruado, literaturo, vojaĝoj, flaŭro kaj faŭno, mineraloj kaj fosilioj.

S-ino Christiane Saling dez. kor. pri vojaĝoj, familio, hejmlando kaj E.-movado. Adreso: Gluckstr. 40, **Potsdam, 1597.**

S-ro Michael Bonin, Lowetscher Str. 4/0506, **Erfurt, 5062,** dez. kor. pri fortosporto kaj muziko.

S-ro Lutz Meier-Knietzsch, PSF 36/64, **Oberlungwitz, 9273,** dez. kor. pri gastronomio, motorsporto kaj E.-movado.

Bulgario

S-ro Ivajlo Kehajov, str. „Rajna Knjaginja" N 05 G, apt. 16, **5004 Veliko Tarnovo,** lernanto, dez. kor. p. ĉ. t.

S-ino Valentina Boŝmankova, komencantino, dez. kor. pri literaturo, sporto (kolektas bildkartojn). Adreso: **5000 Veliko Tarnovo,** obl. Loveĉ, ul. „Maria Gabrovska No. 6, vhod B, n. k. 13.

37jara s-ino Veselka Nenĉeva, p. K. **5400 Sevlievo,** dez. kor. kaj kolektas bildkartojn, suvenirojn.

37jara ĵurnalisto dez. kor. p. ĉ. t.: Svetoslav Slavĉev, **9009 Varna,** ul. Naĉo Stefanov 12.

Dimitâr Petrov, **Sofia 1618,** pk. 132, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, teatro, kino, medicino, E-movado. (28j.)

Dimitâr Petrov, **1000 Sofio, Str.** „G. Kirkov" 8, 28j., dez. kor. pri turismo, vegetarismo, fotoarto, teatro.

ČSSR

Pensiulo, 69j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. kun geesp. en ĉiu aĝo: Stanislav Majer, **783 83 Troubelice 46,** okres Olomouc.

25j. komencanto dez. kor. tutmonde kun 25 — 35j. geesp. pri muziko, turismo, vivo en diversaj landoj: Josef Sučanský, Družba 1193, **768 24 Hulin.**

16j. komencantino, studentino, dez. kor. kun samideanoj el Berlin: Mária Tökölyová, Lipová 186, **okr. Nové Zámky 94102.**

Komencanto, 38j., dez. kor. pri tekniko, vojaĝo, laboro kun ligno kaj muziko. Adreso: Václav Štorek, 1. Maje 1146, **38601 Strakonice I.**

Komencantino, 32-jara, dez. kor. pri literaturo, turismo: Dana Geržová, Uničovská 63, **78501 Šternberk.**

Herausgeber: Kulturbund e.V.
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm. — Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16